

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 594



MAJO 1955



**Julio Baghy, poeto, verkisto de noveloj, romanoj
kaj dramoj, kaj reĝisoro**

Vidu Letero al pioniro sur p. 151

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Jara abono (1955) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Helpredaktoro : R. ROSSETTI
39 Willows Cres., Birmingham 12, Anglujo

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-kupono por ĉiu duo da vortoj

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Legantoj en 80 landoj**Eldonnumero 6250**

Enhavo

	paĝo
La kunveno de l' UEA-Estraro. <i>Hans Jakob</i>	137
La Prezidanto fiŝkaptas kaj meditas. <i>E. Malmgren</i>	139
Firenze. <i>Corrado Grazzini</i>	141
Teatraj pupoj. <i>Lionel Lench</i>	144
Al pioniro. <i>Jan van Twuiver</i>	151
Respondo al S-ro Jan van Twuiver. <i>Julio Baghy</i>	153
Kiaj programoj ? Kia agado ? <i>D. Kennedy</i>	161
Belarta Konkurso 1954. Korespondu ! <i>A. Seemann</i>	168
Poemoj	
La tempo pasas. <i>Julio Baghy</i>	156
Ho, lasu min trankvile revii ! <i>Julio Baghy</i>	158
Konstantaj rubrikoj	
40a Universala Kongreso, oficiala komuniko n-ro 6	140
Centro de Esploro kaj Dokumentado	
Bibliografio de Esperanto-eldonaĵoj	142
Esperanto-tradukoj en <i>Index translationum</i>	143
Esperantista Vivo en la Grupoj. Instruado. <i>J. Guillaume</i>	147
Radio	149
Enigma konkurso n-ro 98	150
Laboro kaj Sukceso. <i>Peter Zlatnar</i>	159
Esperantista vivo kaj Nekrologo	163
Nia forumo	164
Internacia konkurso	165
Novaj libroj	166
Oficiala informilo	174

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 594

Majo 1955



La kunveno de l' U.E.A.-Estraro

19—20 Marto 1955

LA tradicia laŭstatuta kunveno de l' Estraro de UEA okazis nunjare pli frue, por permesi al la estraranoj pasigi paskon en sia hejmo. Tiu-ĉi propono de l' Prezidanto estis ĝoje akceptita de ĉiuj estraranoj.

La nunjara kunveno staris sub signo de sukceso atingita ĉe UNESKO kaj tio-ĉi donis novan kuraĝigan impulson ; ĝi vibris en ĉio kaj certe vibros ankoraŭ dum jaroj venontaj.

Partoprenis la kunvenon Sinjoroj Malmgren, Kennedy, Guillaume, Jakob kaj D-ro Lapenna, plie kiel gasto helpredaktoro Rossetti. La estraranoj D-ro Kempeneers kaj A. C. Oliver demetis la funkcion antaŭ la kunveno. La Estraro esprimis la dankon de la Asocio por plenumita laboro.

La tagordo citis ne malpli ol 38 punktojn plej diversajn : signo de amplekso grandiĝanta de nia laborado. Aparte de l'internaj aferoj, administrado kaj financoj, membraro, jarlibro, revuo k.t.p., ĉefan atenton oni donis al la eluzo de la rezolucio de Montevideo. Pri tio ĉiuj estraranoj sendis detalajn proponojn diskutitajn kaj parte efektivigitajn.

Inter la pli gravaj punktoj de l'tagordo troviĝas la nova statutpropono akceptita de la Komitato per 25 voĉoj por, 2 ne, 2 sindetenoj, publikigita en la Marta-Aprila numeroj de nia revuo. La kontraŭstaro de estrarano Hans Jakob post la voĉdono en Haarlem likvidiĝis per la jena deklaro :

“La Estraro de UEA, kunveninte 19/20an de Marto 1955, diskutis la voĉdonon pri malkonfido flanke de la Komitato al la tri protestintoj, S-ro Hans Jakob, D-ro Kempeneers kaj S-ro A. C. Oliver. S-ro Jakob klarigis la motivojn kiuj igis lin malkonfirmi sian propran voĉdonon en Haarlem favore de la nova statuto,

La Estraro kompreneme aŭdis la motivojn, kvankam ne aprobante la procedon. Laŭ la deklaroj de S-ro Hans Jakob vidiĝas lia deziro kontribui je forigo de efiko de lia kontraŭstaro, en la intereso de la Asocio kaj de nia afero entute.

La Estraro unuanime rekomendas al la Komitato ke S-ro Hans Jakob restu, kune kun la aliaj estraranoj Malmgren, Kennedy, Guillaume kaj D-ro Lapenna, en la Estraro ĝis la Kongreso en Bologna.”

La nuna kunveno staris plie sub la antaŭsigno de la Jubilea Kongreso en Bologna. Laŭ la raportoj ricevitaĵ la 40a Kongreso, kiu ja devus esti la 50a, sen la interrompo pro du militoj, fariĝos manifestacio unuaranga, certe ne forgesota de la partoprenontoj. La Estraro plezure konstatis la celkonscian laboradon de niaj italaj amikoj por la Jubilea Kongreso, de-irpunkto de nova agado por nia afero.

La klariĝo de la malinterkonsento pasinta kreis atmosferon de trankvila sobra kunlaborado, dankata al la komuna deziro eliri sterilan situacion malfavoran al la movado. Pri la unuopaj decidoj aperos laŭbezone informoj en la kutima maniero.

Brilis la suno super la Esperanto-Domo en Heronsgate, kaj spite la malvarma temperaturo ekstere, regis varmeco en la diskutoj, kaj tio daŭre estis ĉies deziro. La Estraro disiris, konvinkite esti bone plenuminta sian devon.

Kaj nun : Antaŭen kun kredo kaj fervoro.

Hans Jakob

venu al Bolonjo—la pivoto al la venko !

Hola, Metiistoj !

S-ro Chareilles, Prezidanto de la oficiala Metia Ĉambro en Bonnat (Creuse), Francujo, intencas starigi *metian Muzeon*. Li alvokas la internacian esperantistan metiistaron petante de ĉiuj laboristoj, teknikistoj kaj metiaj fakuloj, ke ili sendu al li *montrindajn kaj tipajn* objektojn rilatajn al la diversaj metioj, metiajn revuojn kaj ĉion ajn montrantan la vivon de la metioj en la tuta mondo.

Ĉiu sendanto ricevos belan bild-poŝtkarton kun Esperanta teksto.

Aliparte, S-ro Chareilles, gvidanto-fondinto de ferio-centro por metiolernantoj (instalita en malnova rekonstruita muelejo en Bonnat, Creuse) deziras akcepti diverslandajn Esperantistojn dum la venonta somero, por ke en tiu centro regu internacia atmosfero de interfratiĝo. La restadokondiĉoj estas tre malmultekostaj, kelkokaze senpagaj.

Oni skribu en Esperanto al S-ro Chareilles (ĉi-supra adreso). La gastoj kompreneble estu prefere metiolernantoj.




La Prezidanto

fîskaptas kaj meditas

EN la somero mi kutimas pasigi kelkajn semajnojn sur bela insulo. Ofte en la matenoj mi remas mian boaton sur la lagon por fîskapti. Mia kaptilo ne estas multekosta, sed je fîskaptado gravas antaŭ ĉio havi paciencon. Mi havas

Ni varbas homojn por iu kurso, sed kiom ofte ni poste, bedaŭrinde, ne eluzas la kaptaĵon. Ni elspezas multon por la kaptilo: anoncojn, broŝurojn, afiŝojn, prelegojn k.t.p. Sed kio okazas post la kurso? Ĉu ni elspezas same multe—interesiĝon,



paciencon. Tial mi ne malofte sukcesas superruzi iun ezokon aŭ perkon. Iom fiero mi portas la fiŝon al la hejmo kaj diras al mia edzino: “Jen fiŝo!” Kaj ŝi ĝentile ekkrias: “Ho, kiel bela fiŝo!” Kaj mi diras: “Nun vi bonè, kiel kutime, preparu ĝin, eĉ se la butero aŭ oleo kostos pli ol mia fîskaptilo.” Mi asertas al vi, ke ni poste havas veran festmanĝon.

Sidante en iu mateno kun mia fîskaptilo mi komencis mediti pri la komparo inter fîskaptado kaj varbado de novaj esperantistoj. Kaj mi venis al la konkludo, ke ni devas uzi la saman sistemon je varbado de esperanto-adeptoj kiel je fîskaptado. Neniam mi lasas kaptitan bonan fiŝon resti en la boato aŭ sur la strando, esperante ke ĝi estos preparata sen aparta prizorgo.



aman flegadon, monon, materialon (revuoj, libroj)—por fari el la komencantoj verajn esperantistojn?

En ĉiu jaro multaj miloj aŭ dek-miloj da homoj partoprenas kursojn. Ni konsideru nian devon doni al tiuj homoj la impreson, ke ili post la kurso ne estas kvazaŭ forlasitaj. Tute male: Donu al ili la senton, ke ili estas aparte valoraj personoj, ke ili estas ŝatataj, ke estas honoro por ni akcepti ilin en nia rondo. Ne lasu ilin refuĝi en la maron de la nekonatuloj, sed insiste konservu kontakton kun ili.

Jen la tasko de la kluba prezidanto kaj de la estro de propagando. Jen la tasko de ni ĉiuj.

Ernfrid Malmgren

Kaj nun, rigardu malsupron de p. 167



40-a Universala Kongreso de Esperanto

30.VII-6.VIII, 1955, BOLONJO, Italujo

JUBILEA KONGRESO

Adreso : Kongreso de Esperanto ĉe CIT, Piazza
Nettuno 2, Bologna, Italujo

Banko : Banca di Napoli, Bologna, konto 2824

Ĝiro : Grupo "A. Tellini", Medaglie d'Oro 3, Bologna,
N. 8/20620

N-ro 6

OFICIALA KOMUNIKO

Majo 1955

Dua Bulteno : Jam sendita al ĉiu aliĝinto en marto.

Limdato de aliĝo : Konforme al la Kongresa Regularo de U.E.A. la L.K.K. rifuzos akcepti aliĝojn post la 30-a de junio. La aliĝiloj devos esti en Bologna je tiu dato. Je la 30-a de junio la L.K.K. fermas siajn kontojn por fari la necesajn kalkulojn prete por la kongreso. Sekve ne sendu monon al L.K.K. tiel ke ĝi atingos Bologna en julio.

Transporto en Bologna : La urbestro de Bologna jam promesis senpagan veturadon dum la kongresa semajno.

Nomigo de strato : Promesite estas, ke dum la kongreso la magistrato ceremonie inaŭguros straton kun la nomo ESPERANTO honore al la kongreso.

Jubileo : La urbestro de Bologna invitis al la Jubilea Kongreso la urbestron de Boulogne-sur-Mer, hejmo de la Unua Kongreso.

Vesperaj aranĝoj : La festoj okazos jene : sabaton—Interkona Vespero ; dimanĉon—Inaŭguro de I.S.U. kaj programo de dancado por gejunuloj ; lundon—Teatra Vespero (La Revizoro de Gogol en traduko de

Zamenhof) ; mardon—Kongresa Balo ; merkredon—Arta Vespero (muziko) kaj gejunula programo ; ĵaŭdon—libera (gejunula programo) ; vendredon—Jubilea Vespero.


Glumarkoj : Folio de 25 belaj, kun ora surpriso, glumarkoj—50 lirojn, 1 rpk. Mendu ĉe la kongreso aŭ ĉe perantoj.

Loĝigado : La Loĝiga Servo informas, ke ĉiuj unulitaj ĉambroj jam estas rezervitaj. Nepre ne plu mendu sed faru aranĝon pri divido de ĉambro.

Statistiko (ĝis fino de marto) : Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 21, Belgujo 13, Brazilo 3, Britujo 80, Cipro 1, Danujo 36, Finnuloj 46, Francujo 202, Germanujo 90, Hispanujo 5, Irlando 3, Italujo 260, Izraelo 1, Japanujo 1, Jugoslavio 54, Kubo 1, Maroko 20, Nederlando 136, Norvegujo 26, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Sudafriko 1, Svedujo 91, Svislando 25, Urugvajo 2, Usono 12. Sumo el 29 landoj 1,141. Nemembroj de UEA 23%. Instruistoj 18%. Gejunuloj 7%.

Mason Stuttard
Konstanta Kongresa Sekretario

Corrado Grazzini :

Firenze

FIRENZE kun sia Arno arĝenta, kies akvoj fluantaj reeĥigas la amajn sopirojn de Dante, kun siaj krenelitaj turoj kaj elegantaj kampaniloj, kun la mildaj Madonoj de Beato Angelico kaj la Kristoj de Donatello alvokas vin. Ĝi alvokas vin tra la harmonia rondo de siaj ĉarmaj montetoj, de vinberujoj kaj olivarboj.

Rava urbo, patrujo de grandegaj poetoj kaj artistoj, riĉa je nekomparebla historio, Firenze kunigas en si la severan grandecon de la Mezepoko kun la sereneco de la Renesanco. De la XII-a ĝis la XV-a jarcento, de Dante al Macchiavelli, de Giotto al Brunelleschi kaj Michelangiolo, Firenze estis la plej viva fajrero de la

italaj penso kaj arto kaj formis unu el la plej altaj idealoj homaj de civileco kaj beleco.

Fondita de la Etruskoj en la V-a jarcento antaŭ Kristo, poste roma kolonio, ĝi ekakiris gravecon post la jaro mil, prosperis mirinde pro plivastigo de la komerco kaj pro la florado de la industrioj: la venkaj luktoj por la supereco en Toskanio pligrandigis ĉiam pli ĝian potencon. Sian universalan ĉarmon ĝi ŝuldas al la glora historio de sia komunuma ekzistado.

De la unua duono de la XV-a jarcento sub la regado de la familio Medici la prospero de Firenze atingis sian plej helan brilon. Lorenzo il Magnifico vigle personigis la figuron



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Bibliografio de Esperanto-eldonaĵoj

por la jaroj 1953 kaj 1954

LA kunlaboranto de CED, S-ro W. Auld, ĵus finis la Bibliografion de Esperanto-eldonaĵoj por la jaroj 1953 kaj 1954. En la du jaroj aperis entute 241 diversaj verkoj kompare kun 83 en la jaro 1952. Jen la resuma nombro de verkoj laŭ la diversaj fakoj (parenteze estas menciita la nombro de verkoj, publikigitaj en la sama fako en la jaro 1952) :

Aŭtobiografio 1 (0) ; belartoj 4 (0) ; biografio 2 (1) ; diversaĵoj 7 (1) ; dramo 2 (1) ; Esperanto-Movado 9 (5) ; fikcio 9 (7) ; filatelo 1 (0) ; geografio 5 (0) ; kantoj 12 (5) ; legolibroj 2 (2) ; lernolibroj 20 (11) ; lingvistiko 5 (1) ; poezio 9 (6) ; propagando nacilingva 30 (7) ; religio, filozofio, etiko kaj psikologio 16 (2) ; sciencoj 3 (5) ; sociologio kaj politiko 13 (3) ; stenografio 1 (0) ; turismaj

de princo, ŝtatesto kaj mecenato, kaj sub lia regado la artoj floris en Firenze signante la plej grandan epopeon de la homa spirito. Dum tiu tempo oni konstruis la plej famajn monumentojn. Lingvo, arto, literaturo havis sian plej altan esprimon.

La Granda Duklando de Toskanio, kreita de Medici en la XVI-a jarcento, pasis en la XVIII-a al la Lorena familio, kiu forlasis la urbon en la jaro 1859. Dum mallonga periodo, de 1865 ĝis 1871, Firenze estis la ĉefurbo de la nova unuigita ŝtato Italujo.

Ankaŭ dum nia jarcento ĝi estas je la avangardo de la kultura kaj arta movado. Akademioj, lernejoj kaj kulturaj institucioj donas al studentoj senfinajn fontojn de scio kaj plezuro.

Firenze atendas vin. La kupolego S. Lorenzo, S. Spirito, palaco Pitti, la loĝioj de la Innocenti, la kapelo Pazzi, diras al vi la saluton de Brunelleschi. Salutas vin Arnolfo di Cambio per Palazzo Vecchio, Giotto

per la kampanilo, Ghiberti per siaj Pordoj de la Paradizo. Jen la Perseo de Cellini, la Pietá de Michelangiolo, jen Botticelli, Andrea del Sarto, Masaccio. Jen la cent kaj cent ĉefverkoj kiuj ornamas preĝejojn ; monakejojn, palacojn, konataj en la tuta mondo.

Sed Firenze alvokas vin ne nur per la gloro de la pasinteco, per la gravaj muzeoj kaj riĉegaj galerioj sed ankaŭ invitas vin al siaj sugestiaj promen-ejoj, al siaj mirindaj ĝardenoj kaj ombroriĉaj parkoj, al siaj pentrindaj ĉirkaŭaĵoj, al la allogaj spektakloj kaj amuzaĵoj, al la modernaj stratoj, artaj magazenoj, luksaj hoteloj, famkonataj restoracioj, kiuj altiras tutmondan homamason.

Bonvenon al vi, samideanoj ! Supreniru al Fiesole, supreniru al la Piazzale Michelangiolo : jen estas sub via rigardo kaj tute ĉirkaŭe vastiĝas rave la panoramo de la urbo, de la altaĵoj kaj de la Arno-valo.

(per Informservo de la Jubilea Kongreso)

k.a. prospektoj 79 (21) ; vortaroj 11 (5) ; entute 241 (83).

Kvankam la kresko kompare kun la jaro 1952 ne estas granda, tamen ĝi montras konstantan progreson.

Estas menciinde, ke en la periodo de 1945 ĝis 1952 entute estis publikigitaj 475 diversaj verkoj kaj aliaj publikaĵoj. Tio signifas meze ĉ. 68 ĉiujare. Ankaŭ kompare kun tiu periodo estas rimarkebla kontentiga kresko. Entute, do, de post la finiĝo de la milito ĝis la 31-a de Decembro

1954 aperis 799 diversaj publikaĵoj.

Sinjoro Auld nun kompletigas la Bibliografion por la periodo inter 1929 kaj 1945. Tiu laboro estos finita ĝis la 31-a de Decembro 1955. Ĝis tiu dato estos ankaŭ finita la Bibliografio por 1955. Tiamaniere komence de 1956 estos eble publikigi Bibliografian verkon pri la Esperanto-publikaĵoj inter 1929 kaj la fino de 1955. Kiel konate, la verko "Bibliografio de Internacia Lingvo" de P. E. Stojan rilatas al periodo ĝis 1929.

Esperanto-tradukoj en Index Translationum


Antaŭ la dua mondmilito la Instituto por Internacia Intelektua Kooperado eldonadis Bibliografion de tradukoj. Post la milito tiun taskon transprenis UNESKO. La unua volumo de *Index Translationum* aperis en Parizo en 1949. Post tio aperis pluaj volumoj. La lasta, rilatanta al la tradukoj aperintaj en 1953, estas ĵus publikigita.

La Indekso enhavas liston de la tradukoj laŭ la landoj. La lasta volumo rilatas al 47 landoj kaj ĝi entenas 18,139 titolojn. Ĉiu landa ĉapitro estas subdividita laŭ la dekuma klasado. Sekvas alfabeto listo de aŭtoroj, alfabeto listo de tradukintoj kaj alfabeto listo de eldonejoj. Post ĉiu libro estas menciita la lingvo de la originalo, sed ne tiu de la traduko. Se la lingvo de la traduko estas alia ol la lingvo de la lando, en kiu aperis la libro, antaŭ la titolo troviĝas la signo : □

En la ĝisnunaj eldonoj la Esperantaj tradukoj estis tre malbone kaj

manke enlistigitaj. Krome, en la titoloj de la Esperantlingvaj tradukoj ofte troviĝas diversaj preeraroj. Fine, ĉar ne ekzistas "Esperanta teritorio aŭ ŝtato", ĉiuj Esperantaj libroj estas signataj nur per la signo : □, sed la lingvo mem estas nenie menciita.

Okaze de sia vizito al la Sekretariato de UNESKO, la Honorofica Direktoro de CED priparolis ankaŭ tiun demandon surbaze de tre kompleta raporto, kiun faris la kunlaboranto de CED D-ro M. Waysblum. La rezulto de tiu konversacio estas, ke estontece la Esperantaj tradukoj estos komplete reprezentitaj en *Index Translationum* kaj Esperanto estos aparte menciita en tiu verko. CED nun kolektas kaj ordigas la tutan materialon por la periodo inter 1945 kaj la fino de 1954, tiel ke jam en la volumo de *Index Translationum* publikigota en 1956 aperos ĉiuj Esperantaj tradukoj publikigitaj post la milito.



Teatraj Pupoj

Mi estas artstudento faranta nun la pedagogian (la 5-an) jaron kiel artfakulo. Iun tagon, kiam mi parolis kun demonstracio al la studentaro pri teatraj pupoj, mia docento S-ro Rossetti invitis min verki artikolon tiuteman por la Revuo Esperanto. Mi sentis min tre honorata kaj volonte mi pretigis la jenan senpretendan studeton. Mi antaŭdankas eventualajn korektojn kaj rimarkojn pri mia temo. Mia adreso estas: 30 Lark Hill, Kidderminster, Anglujo.

Lionel Lench

TEA TRA PUPO estas figuro de kia ajn granda, funkciigata de homo. Sub la vorto *pupo* oni ordinare komprenas ion malgrandan, sed troviĝas ankaŭ pupoj grandaj, eĉ grandegaj. En germana filmo pri *Siegfried* oni uzis grandan drakon, 20 metrojn longa, kiun de interne funkciigis tridek viroj. Ĝi tamen estis "teatra pupo".

Kredeble la plej malnova tia pupo ekzistanta estas antikva Egipta kato en la Brita Muzeo en Londono. Ĝi estas movpupo el la plej simpla tipo, havante ŝnureton tra la kapo ĝis la malsupra makzelo, kaj per tio ĝi ricevas la solan movon: tiun de la buŝo.

La mezepokaj loĝantoj de Eŭropo bone konis la gantopupojn, ĉar ĵonglistoj kaj histrionoj ilin eltiradis el sub la mantelo por amuzi la rigardantojn. En gravuro de la 18a-jarcenta angla artisto William Hogarth oni vidas marionetojn ĉe la foirfesto de S-ta Bartolomeo (24a de Aŭgusto). La marionetoj aŭ *faden-pupoj* estis efektive popularaj jam en la 17a jarcento. Per tiu ĉi vorto oni komprenas pupon komplet-forman kaj manipulitan de supre per fadenoj.

En 1753 Goethe verkis dramojn por pupoteatro kaj ĉidume ricevis inspiron

por sia *Faŭsto*. En la pentraĵoj de la itala Francisko Guardi (1712–1793) oni multfoje vidas prezentita la pupo-budon.

En la 19a jarcento la pupo fariĝis pli realisma. Tre popularaj en Anglujo estis la ombropupoj. Oni nomis tion "gallanty shows" (galanta aŭ gaja spektaklo) kaj la figuroj estis el plata kartono aŭ el lado. Iliaj movoj estis tre simplaj kaj ili estis pentritaj nigre ambaŭflanke. Du el la plej famaj pupeatroj en Italujo estis fonditaj en la 19a jarcento: ili estis la *Teatro Gerolamo* en Milano kaj la *Teatro Granduca* en Torino. Mi opinias, ke ĉi ambaŭ teatroj ankoraŭ floras.

Teatraj pupoj estas divideblaj en la jenajn tipojn.

Plej simplaj estas la plate eltonditaj figuroj, ĉu el kartono, papero, ledο aŭ lado. Ilin oni povas uzi por prezenti historian kavalkadon. Ĉiu figuro staras sur ligna bazo kaj estas ŝovata sur la scenejon per stangeto kun alfiksita plato el ligno.

Alia tipo de movpupo estas la manika aŭ ganta pupo, laŭ la konata speco pulĉinelo. Oni nomas tiun specon ankaŭ manpupo, *guignol* (france), *Kasper* (germane) aŭ (en Usono) senkorpa pupo. La pupoj povas havi kapojn skulptitajn aŭ

faritajn el paperkaĉo. Pulĉinelaj gantopupoj por interbatiĝaj farsoj devas havi fortikajn lignajn kapojn. La tri ĉefpartoj: kapo kaj brakoj, estas fiksitaj al baza vesto, ordinare el fortika nigra ŝtofo. Tio estas la maniko, kaj devus esti longa ĝis la kubuto de la manipulanto. Sur tiun veston oni kudras la apartan kostumon de la pupo. Gantopupoj ordinare ne havas krurojn. Escepto estas la Angla "Punch" (pulĉinelo), kies kruretoj ebligas al li sidi sur la scentabulo.


Aliaj tipoj estas la ombropupoj kaj stangopupoj (aŭ dratpupoj). Ombropupoj varias laŭ tipo, sed la maniero ilin prezenti estas ĉiam sama: per

ombroludon estas havi ekranon el subtila tolo streĉitan tra la sceneja aperturo, kaj lumon lokitan malantaŭe je unu metro de la ekrano kaj super la kapoj de la manipulantoj.

Granda valoro kuŝas en la gruplaboro ĉe tiaj entreprenoj, kaj (en lernejo) ĉiu infano devus plenumi ian parton en la plano.

Artifikaj pupoj

Artifikaj pupoj aŭ surpriz-pupoj estas vasta tereno, kies surfacon oni ĝis nun apenaŭ gratis. La pupfaranto devas kompreneble marŝi antaŭ ol salti, sed kiam li venkis la teknikon de la ordinara pupoj li trovos la surpriz-pupojn sorĉe interesaj.



1. *Sicilia marioneto.* 2. *Java marioneto.* 3. *Turka pupteatro.*
4. *Adapto de la turka ideo en Birmingham (homo interne).*

Ilustraĵoj de la aŭtoro

projekcio de la ombro sur ekrano.

Plej konataj el ĉiuj ombropupoj estas la Java *wayang*. Ili estas ordinare el haŭto. La kutima maniero manipuli ilin estis per stangetoj el sub la ekrana nivelo. Interesa trajto de la Javaj pupoj estis tio, ke la figuroj havis grandon proporcion al ilia graveco: la heroo estis tre granda kaj la fripono tre malgranda.

Ĉinaj ombropupoj estis el maldika diafana haŭto. Ĉe ili oni ankaŭ enkondukis kolorojn sur la ekranon.

La ĝenerala maniero prezenti

Troviĝas multaj famaj kaj tradiciaj specoj de surpriz-pupoj: ekzemple la dismembriĝanta skeleto kaj la Grandioza Turko, kiu ŝanĝiĝas en ses aliajn pupojn malgrandajn. Ekzistas returniĝaj pupoj (nova figuro sur la dorsflanko), sonantaj pupoj, kaj la germanaj metamorfoz-figuroj. Marionetoj povas eligi fumon; drakoj povas sputi flamojn, kaj belulino povas fariĝi virinaĉo per faligo de masko.

Interesa evoluaĵo estas la harmonia kombino de homoj kaj marionetoj.



La aŭtoro manipulas toreadoron kaj vikingon, kiujn li faris

En iu prezentado de *Peter Pan* Peter dancis kun figuroj, kiuj efektive estis marionetoj. En la turkaj teatroj oni kombinis tre efekte la manpupojn kun la homo, kaj ni en Birmingham prezentis spektaklon dum Kristnasko 1952 laŭ la sama ideo.

Laste venas marionetoj aŭ fadenpupoj, kiuj en la teatropupa mondo

ludas la plej vastan rolon.

Marioneto estas figuro ordinare skulptita el ia ligno, artikita, kaj kun fadenoj alligitaj tiele, ke tiro de iu fadeno movas la respektivan pupoparton.

“Belgaj marionetoj” havas nur unu dikan draton kiel subtenon. Siciliaj marionetoj estis tre ornamitaj kaj havis ordinare nur unu movon.

Teatraj pupoj postulas flekseblan talenton pri artoteknikoj. Tio ampleksas desegnon kaj faron de kostumoj, ĉarpentadon, lignoskulptadon, scenpentradon, voĉarton, muzikon kaj lumefektojn.

Pupismo havas multajn uzojn. Ĝi povas servi, krom por distro, ankaŭ en reklamo kaj edukado. Por komerca reklamo taŭgas verŝajne pupoj el papero.

En edukado la puparto povas multe ekzerci la sinesprimadon de la infanoj. En la klasĉambra teatro la gvidprincipo devus esti simpleco. La sceno devas esti larĝefekta, la pupoj devas esti simplaj kaj facile manipuleblaj por la infanoj—kaj estas ligo kun aliaj instrufakoj se la infanoj verkas siajn proprajn drametojn.

Lionel Lench



Esperantista Vivo en la Grupoj Instruado

ONI ne povas imagi la ekziston de grupo esperantista, kiu ne organizus ĉiujare almenaŭ unu kurson. La rolo de la lokaj grupoj konsistas esence en instruado de nia lingvo; la grupoj devas do havi ĉiam unu kurson, eĉ se tiu kurso nur devas kunigi kelkajn lernantojn; ĝi estas la fundamento de la tuta agado de la grupo.

Por prepari la malfermon de ia kurso, oni devas ĝin konigi per antaŭa prelego anoncita de la loka gazetaro. Sed tiu prelego ne povas sufiĉi por certigi la sukceson de la kurso. Afişoj devas laŭeble esti algluataj sur la fasado de la oficialaj afişejoj, kaj en la ĉefaj butikoj kaj vendejoj de la urbo. Prospektoj devas esti disdonataj ĉe la pordo de la instruejoj. Aliparte, vizito devas esti farata al la estroj de ĉiuj lokaj lernejoj por klarigi al ili la utilecon de la internacia lingvo kaj ĝian nunan disvastiĝon.

Ekspozicio montranta la servojn jam riceveblajn per la lingvo devas esti farata en salono disponebla de la urbo: salono de la urbdomo, aŭ tute simple magazeno de komercisto, sur granda ligna panelo malantaŭ larĝa fenestro.

La prelego devas esti preparata laŭ la publiko kun la helpo de filmo se oni povas, kun la celo forte allogi la ĉeestantojn. Je la fino de la parolado oni provos noti nomojn kaj adresojn de interesitoj kaj oni disdonos esperantan dokumenton, kiu surportos la daton kaj adreson de la kurso.

Koncerne la kurson, la ĉefa afero konsistas el la elekto de la instruanto.

Ĉiujfoje kiam oni povas, oni elektos profesion instruanton. Kompreneble, en la malgrandaj centroj, oni ĝenerale ne povas elekti kaj la plej sindona samideano faras sian eblon.

La lernantoj devas pagi aliĝilon. Kvankam idealistoj malaprobas tion, laŭ multaj spertoj ni havas la pruvon ke oni lernas pli bone kiam oni elspezas monon por kurso. Esperanto havas gravan valoron: ĉiu pagu por akiri la konon. Tiel estas normale doni al la instruanto monan kompenson konforman al la prezoj de samaj servoj en la urbo. Tamen oni povas konsenti rabaton por infanoj, soldatoj kaj malriĉuloj.

Pri la metodo de instruado, tio dependas de la ĝenerala kulturo de la lernantoj. Se tiu ĝenerala kulturo ŝajnas malforta, precipe en la malgrandaj centroj, oni uzos la rektan, senperan metodon. Se oni instruas studentojn, personojn pli aĝajn, oni uzos la metodon klasikan, pli rapidan, kiu permesas al la lernanto tuj kompreni la sencon kaj la pravigon de reguloj de gramatiko, logikaj, kiuj plaĉas al la spirito.

Oni povas en tre miksitaj publikoj uzi diversajn metodojn. Jen ekzemplo: Unue komuna korekto de la faritaj hejmtaskoj (la lernantoj interŝanĝas kajejojn)—poste instruado de la gramatiko per klasika metodo—komuna legado kun traduko—kaj fine vivanta kurso kiel faras S-ro Ĉe kiu permesas rapide konversacion.

Je la fino de la unua leciono, oni anoncos ke konkurso okazos post la lasta leciono, inter la lernantoj de la kurso. Premioj estos donataj de

membroj de la grupo, de asocioj, de la komunuma konsilo, aŭ de la grupo mem, al la plej bonaj lernantoj. Estas konsilinde ke la nacia asocio elektu unu aŭ du lernantojn kiuj iros al la internacia kongreso senpage.

La instruanto devas interesi la lernantojn pri la internacia vivo. Praktike ni devas klarigi niajn celojn kaj avantaĝojn—doni novaĵojn kaj faktojn pri la movado — rakonti anekdotojn. Por kateni novulon estas bone doni al li eksterlandan korespondanton.

Konstante oni devas zorge atenti pri la ĉeesto de ĉiuj lernantoj enskribitaj, ĝis la fino de la kurso. Se unu lernanto ne ĉeestas unufoje, oni devas sendi leteron al li, aŭ al lia familio se li estas juna.

Aliparte, oni devas konsideri la lernantojn de la Esperanta kurso kiel membrojn de la grupo, senpage enskribitajn dum la unua jaro. Oni devos kunvoki ilin al ĉiu kunveno de la grupo, por ke ili interesiĝu al la movado, kaj konatiĝu kun la aliaj grupanoj. Oni kunvokos ilin al la regionaj, naciaj kaj internaciaj kongresoj, kiuj incitos ilin lerni pli rapide la lingvon.

Kompreneble, ni ne havas la pretendon fiksi netuŝeblan modelon de la organizo de la kursoj por la tuta mondo, organizo kiu devas diferenci laŭ la landoj, laŭ la eblaĵoj donataj de la politikaj institucioj, laŭ la moroj kaj kutimoj de la homoj, sed ni opinias ke, en ĉiuj landoj oni povas almenaŭ fari ion similan al tio, kion ni priskribas ĉi tie.

J.G.

Por la 41-a Universala Kongreso en 1956 la Estraro akceptis la inviton de Kopenhago.

Per kelkaj linioj


Ĝermas Esperanta mondpopolo. La Mondcivitana Respubliko (oficiala lingvo Esperanto) nun prilaboras sian konstitucion kaj anoncas “fondon fonduson” (bone! — neeble ja diri fonda fondaĵo!) kun minimuma celo £8,000, por la konstitucia asembleo en 1956. Klarigan broŝuron sendas la Informa Fakto, 27 Red Lion Street, London W.C.1.

Tiu preskoboldo! La rilata cirkulero diras: “La Sekretario fidas ke, adoptinte la Konstitucion, la Respubliko ricevos agnoskon de sufiĉa nombro de **resistaroj** por ebligi, ke ĝi funkciu kiel nepartia popolo, kiu servos al la tuta homaro sen distingo.” Oni korektu per **g** aŭ **z** laŭ sia temperamento.

Disfloru Esperantaj poŝtmarkoj! Oskar Berman el Tel-Aviv proponas, ke ĉiulandaj e-istoj instigu siajn poŝtadministraciojn eldoni Zamenhofajn poŝtmarkojn okaze de (1) la 70-jara jubileo de la debuto de Esperanto je 14 Julio, 1887, kaj (2) 100-jara jubileo de la naskiĝo de la Majstro je 15 Decembro, 1859. Tre sekvinda iniciato.

Sukceso elluktita. Fondiĝis Esperanto-rondeto ĉe Entreprena klubo Stalinovec en **Martin**, Ĉeĥoslovakio. Funkcias nova kurso kun 30 lernantoj, ankaŭ klubkunvenoj. Por venki la nevarman etoson oni petas solidaran apogon de alilandaj amikoj per salutleteroj, ekz-roj de gazetoj, klubaj bultenoj ktp. Ĉion afable al: Sek-io Eduard V. Tvarožek, Hviezdoslavova ul. 2/III, Martin, ĈSR.

Al “**Esperanto-Postkongreso 1955**” (agnoskita de la LKK en Bolonjo) invitas la Esperanto-Societo Stuttgart. La programo, dissendata al la UK-partoprenontoj, enhavas prelegojn, ekskursojn, amuzan vesperon kaj la viziton al impona Landa Ekspozicio Baden-Württemberg, kiu ankaŭ estos valora por komercistoj kaj teknikistoj. Interesuloj anoncemaj bv. peti informojn per “Esperanto-Postkongreso”, Pflasteraeckerstr. 45, STUTTGART 13 (Germanujo).



Radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.45–23.00	Hilversum. 402m. P. (nur 10-V). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	14.50–15.00	Ljubljana. 327m., 211m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 25.61m. P. D-ro Baur.
	19.15–19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	18.10–18.25	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	22.05–22.15	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	06.45–06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45–23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	18.10–18.25	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15–19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 370m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, La Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.7m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	18.45–19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 4-V, Mondo Esperantista ; 6-V, La pagana kaj kristana Pompei ; 11-V, Novaĵoj el Italujo ; 13-V, La tago de bonvolo ; 18-V, Premiitaj kanzonoj ĉe la Festivalo de Sanremo ; 20-V, La 690-a datreveno de la naskiĝtago de Dante Alighieri ; 25-V, Capri, la insulo de la sirenoj ; 27-V, Leterkesto kaj bibliografio.

Elektu diskon por disaŭdigo al la alilanda amiko ! Skribu Esperante al Franca Radio, petante la diskon (Esperantan aŭ ne). Via amiko povos ĝin aŭdi kun via mesaĝo sabate de 21.00–23.00 G.M.T. sur ondoj de franca staciario "Paris inter." : 1829m., 513m., 202m., 201m., 193m., 188m., 48.39m.

fino sur p. 150



Enigma Konkursio N-ro 98

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 89 Av. du Sacré Coeur, Brussel-Jette, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkuponon internacia.

Solvoj :

N-ro 217 : La solvo de ĉi tiu enigmo aperos en la venonta numero ĉar en la enigmo troviĝas (pro mia eraro) tri malkorektaĵoj, pro kiuj mi eskuzas min. 6 devas esti : tигра + aldo ; 12 devas esti : basto + lumi ; 18 devas esti : rento + vian.

N-ro 218 : skal - fide - rare - akra - nord - blok - seps - egid - sorb - atut-pike - mard - skun - vulp - atol - vilo - amas - torf.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 94-a konkurso : S-ro F. Lautenbach (Germ) 118, S-ro S. Roca Rodo (Hisp) 109, S-ro G. Morgand (Franc) 109 p.

Enigmo N-ro 221 : Prenante el la tri vortoj sub unu numero po unu silabo, oni povas formi novajn trisilabajn vortojn, kies mezaj literoj formas esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. verdikto - nigelo - laguno ;
2. vertico - konspiri - cinabro ;
3. kimono - etendi - impresio ; 4. klopodi - kombini - ozono ; 5. muziko - aperti - kritiki ; 6. rikolti - dekokti - tribordo ; 7. korneto - artrito - kopeko ; 8. ezoko - satrapa - penetri ; 9. endormi - bicikli - procento ; 10. soriko - burleska - nufaro ; 11. kliniko - aparta - sindona ; 12. ciklono - sekura - signifi ; 13.

galanto - procedo - lumbriko ; 14. libreto - brokanti - brikoto ; 15. kondoro - sekanto - taroko ; 16. kolbaso - sekstanto - trabori ; 17. patrino - soriko - komposti ; 18. tribordo - rokoko - promesi ; 19. citrono - feliĉa - tropiko ; 20. provizi - kokluŝo - reformi ; 21. lozanĝo - freneza - kredito ; 22. urtiko - bandaĝo - perturbo ; 23. torento - ferdeko - kretono ; 24. korniko - akrido - serena ; 25. kvincento - pedanta - okulta ; 26. lekanto - patrono - beletro ; 27. patrolo - klorozo - remburi ; 28. balzamo - bostono - traduko ; 29. primolo - korekti - kapabla ; 30. kovrilo - bramano - primato ; 31. klarigi - enmigri - trudema ; 32. malmulte - koverta - konturo.

Enigmo N-ro 222 : Forprenu unu literon el la ĉi-subaj vortoj, tiel ke vi ĉiufoje povas formi novan vorton el la restantaj ses literoj. La forprenitaj literoj devas formi esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. impresio ; 2. formulo ; 3. diabeto ; 4. elektro ; 5. aparato ; 6. kastoro ; 7. kliento ; 8. plateno ; 9. kostumo ; 10. inklino ; 11. kanario ; 12. piaŝto ; 13. kariolo ; 14. eskadro ; 15. galerio ; 16. regiono ; 17. krotalo ; 18. lamento ; 19. orakolo ; 20. granato ; 21. asekuri ; 22. kartono ; 23. materio ; 24. atriplo ; 25. malario ; 26. kondoro ; 27. lobelio.

Esperantaj kantoj, muzikaĵoj, kabaretaĵoj estos grupigitaj iun venontan sabaton, kredeble komence de Majo.

Adreso : Radiodiffusion Française, Programme "Bonsoir l'Europe, Ici Paris", 107 Rue de Grenelle, Paris 7.

Al Pioniro

Vi ne konas min. Sed mi konas vin. Tial mi kuraĝas skribi al vi. Mi scias nek vian adreson nek ĉu letero de mi atingos vin. Nun mi skribas al vi pere de tiu ĉi gazeto. Eble hazarde vi legos ĝin. Jes, ni iris kune dum parto el niaj vivojoj—nur vi iris pli frue ol mi.

Permesu al mi ke mi rakontu ion pri mi mem. Mi loĝis en malgranda vilaĝo en okcidenta parto de Nederlando. Poste miaj gepatroj transloĝiĝis al Alkmaar, beleta agrikultura urbeto.

Tiun urbon vi vizitis—tie vi paroladis—tie vi fervore instruis samideanojn. Sed mi ne sciis tion. Mi neniam aŭdis pri via agado—nek pri vi. Venis la milito—milito dum kiu nia kara lando multe suferis. Tiamaniere oni devigis min labori en malamika lando.

Tie mi vidis kaj travivis multe. Mi iomete parolis kun francoj, belgoj, poloj, ĉeĥoslovakoj. Estis vere popolkongreso en la urbo—ĉe la

fabriko kie ni devis pene labori kaj suferi sub la malbonaj traktadoj de niaj “mastroj”—sub la multaj bombardoj de niaj amikoj—liberigontoj. Tiam mi fariĝis homo. Mi vidis kiel unu homo batis la alian per kolbo de fusilo.

Tie mi renkontis militkaptitojn—hojmojn kiel vi kaj mi kiuj devis malsati en koncentrejoj.

Tie, tamen, mi ankaŭ spertis la gastamon de la simpla kamparano—kiu NE estis nia malamiko. Tie la ideo: “Ni ĉiuj estas fratoj” kreskis ĉe mi.

Post la milito—feliĉe—mi povis iri hejmen. Dum malsano pro la vivo tie mi devis resti hejme dum kelka tempo. Hazarde mi trovis ie Esperantan lernolibron.

Tiam mi fariĝis Esperantisto. Mi fervore studis la lingvon dum miaj liberaj horoj, tiom mi studis Esperanton ke mia faka studado ege neprogresis.

Internaciaj Feriaj Esp-Kursoj en Helsingør, Danlando,

okazos 17–24 de julio, 1955

Kursoj: Daŭriga, konversacia, preparo por Cseh-metodaj instruistoj—kaj por infanoj.

Prospekto havebla ĉe:

**L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.**

E.55 ROTTERDAM. Geesperantistoj kaj aliaj, kiuj intencas viziti Rotterdam okaze de E.55, 18/5–3/9, povos tranokti je modesta prezo en “Zuider Volkshuis”, Brink 7, Rotterdam-Z.

Ĝi estas aranĝita kiel junulargastejo, tiel por grupoj kiel por unuopaj personoj. Facile atingebla per tramlinio 3 kaj aŭtobusoj 50 kaj 52.

E.55 estas grandioza manifestacio de la Nederlanda Energio, dek jarojn post la liberiĝo.

Petu cirkuleron pri prezoj k.t.p. ĉe suprenomita adreso.

Esperanto kaptis min tute. Kaj iom post iom ankaŭ la “interna ideo”.

Mi anoncis min por ekzameno. Unu diplomo, du—Mi devis legi ses librojn. Fakte mi nur funde legis unu libron. Estis libro de *vi*, mia kara pionira samideano. Ankaŭ vi iam estis “viktimo” de la milito. Kiom bone mi komprenis la vivon de Johano—la ĉefa persono el via libro. Kiel li vivis en militkaptitejoj, kiel li aktoris—kiel li propagandis nian karan lingvon. “Sur sanga tero”—jes, sed kun entuziasmo, kiu ankaŭ infektis min. Ĉu Johano ne diris: “Nia movado savos la mondon”?

Viaj libroj ravis min. Mi adoris vin, malgraŭ la fakto ke mi bone sciis ke ne estas bone tro adori sin mem aŭ alian homon. Poste mi komprenis viajn vortojn: “La plej granda doloro estas ami la homojn”.

Mi aĉetis ĉiujn librojn de vi, kiujn mi nur povis akiri.

Per via “migranta plumo” kiu skribis ke “homeco estas plej alta idealismo” vi kunprenis min al diversaj landoj. Ni iris duope—man-en-mane “preter la vivo” kaj kiam mi ĉirkaŭbrakis junan knabinon (estis en oktobro) ankaŭ por mi estis “printempo en la aŭtuno”.

Jes—mi devas konfesi—ne ĉiam la Esperanta klubvivo donis ĝojon al mi. Multfoje mi renkontis “Verdajn Donkiĥotojn”, homojn ridindajn por siaj samideanoj—kaj por la publiko ekster niaj vicoj. Dolĉa estis tamen la Esperanta poemaro—la kantoj de la Vagabondo ravis min.

Kara pioniro—mi ŝatus danki vin pro via laboro por la Esperanto-movado kaj la Esperantistoj. Certe ankaŭ Esperanto ludis tre gravan rolon en via vivo. Jes—mi dankas

vin. Ĝis tie ĉi mia letero al vi ne estas stranga. Sendube vi ricevis multajn tiajn leterojn dum via aktiva vivo. Estas ALIA afero pri kiu mi volas skribi al vi.

Longan tempon mi ne aŭdis aŭ legis ion pri vi. Lastatempe mi legis kelkajn poemojn en Esperanta revuo. Mi konkludis el ili ke eble vi perdis la kuraĝon. Eble vi opinias ke la vivo fakte estas sencela, estas iluzio. Eble la Esperanta ideo ne plu altiras vin. Eble vi opinias ke nia movado neniam atingos sian idealon. Kara samideano—pri viaj nuna vivo kaj vivkonceptoj mi ne rajtas juĝi (estas sankta tero, sur kiun ni ne rajtas paŝi).

Eble ni mem—kiam ni estos maljunaj—same opinios kiel vi. Sed kun *granda malĝojo* mi legis viajn poemojn. Ŝajnas al mi ke vi falis de montopinto en nigran abismon—kaj parte vi kuntrenis min en la mallumon de via pesimismo.

Jen mi legis anstataŭ “Printempo en Aŭtuno”—aŭtunan grimacon. En letero al ĉarma koleginino vi plendas pri via nuna vivo.

Tamen — mia kara samideano — ankaŭ je via 63a naskiĝtago vi NE estas sola. Ni ĉiuj estas kun vi. Viaj vivo kaj laboro—kiel ajn vi nun pensas pri ili—NE estis vanaj. Vi instruis al ni multon — vi donis kuraĝon al ni.

Junaj batalantoj transprenos ankaŭ vian taskon. Tial mi petas al vi: ankaŭ se vi nun eble ridetas amare pri niaj klopodoj—prefere bonvolu SILENTI ol paroli, por ke ni NE PERDU LA KURAĜON.

Kun kora manpremo,

Jan van Twuiver

Alkmaar.

Respondo al S-ro Jan van Twuiver



Budapest, 15-an de Marto, 1955.

Amiko,

al tiu alparolo rajtigas min la kore intima tono de via publika letero. Ĝi revoke vekis sentimenton, neniam velkintan. Ĝi alportis sopiratan emociion, pravigon de ĝistomba konvinkiĝo, promesoplenan esperon pri estonteco kaj . . . kaj ankaŭ riproĉeton, akuzon, iom maljustajn pro miskompreno.

Profitante la permeson de mia redaktoro-amiko Reto Rossetti mi klopodos respondi al vi kaj al ĉiu, kies simpatio kelkfoje honoras min per kelke da intervjuaj demandoj. Mi ĝojus, se mi sukcesus almenaŭ parte kontentigi la scivolon.

Via letero venis el lando, al kiu profunda danko ligas min kaj al kiu ofte nostalgio reflugas miaj revoj. Ĝi estas datumita en urbeto, kie mi havis kvazaŭ duan hejmon. Viaj aludoj pri mia iama agado tie rapidkure vicigis bildojn en mi pri la bela kaj rezultoriĉa tempo de mia ŝatata

kulturlaboro ; epizodoj reviviĝis, kanaletoj, stratoj, karakterizaj dometoj, kluzoj aperis, mi revidis miajn frisajn geamikojn, kiuj kun sama sankta obstino batalis por nia afero kiel ili kaj iliaj generacioj batalas kontraŭ la malica maro dum jarcentoj. Jen ankaŭ nun, skribante ĉi tiujn frazojn, varma emocio regas min rememorante pri la iamaj kunbatalantoj . . . eĉ rideto serenigas mian mienon, ĉar mi kvazaŭ reaŭdas la ĵaluzetan rimarkon de miaj ceteraj nederlandaj geamikoj, same kiel iam : “Vi amas nur viajn frisojn !” . . . La ĵaluzo estis ŝerca kaj senbaza, ĉar la vorteto “nur” vere estis troigo, aŭ pli trafe—estis etigo. En ĉiu loko, vizitata de mi, mi havis sincere amatajn geamikojn kaj mia liro komplimentis ne sole al la frisaj ĉarmulinoj, sed al ĉiu ravanta samideanino nederlanda. Do la atribuita prefero ne trafis veron. Fakte mi estis profunde impresata de tiuj gigantaj taskoj, kiujn fortostreĉe kaj sukcese solvis la celkonscia laboremo, patriota amo de la tuta nederlanda popolo en parto, loĝata de la bravaj frisoj : konstruado de la Granda Digo, sekigo de la Suda Maro, kreo de polderoj ktp. La optimisma progreso de la lando—tute kompreneble—esprimiĝis plej efike tie, kie la eksterordinaraj problemoj postulis la plej grandan fortostreĉon : en Frislando. Tial estis kaj restis por mi tre karaj la spontanea infana gajo kaj sindona laboremo de niaj frisaj gesamideanoj. Dankon al vi pro la revokitaj rememoroj !

Post tia enkonduka konfeso vi facile povas prezenti al vi, ke viaj

frazoj trovis bone preparitan animstaton por rekoni kaj akcepti la novan, jam *sopiratan* emocion: *la eĥon de mia propra voĉo, resonanta en la interno de nia juna esperantista generacio*. Mi vidis min en *via* aĝo, kiam mi, obsedita de la ideo mem, decidis dediĉi mian vivon al nia afero. Ne famiĝi, sed nur servi mi deziris kaj kiel via letero pravas, mi sukcesis honeste plenumi mian devon memvolan. Mi aspiris esti nur ŝtupo por tiuj, kiuj same memvole donos sin al la plua vojpreparo kaj espereble mi sukcesis plifaciligi la vojiron al miaj junaj, kaj tre talentaj gekolegoj. Mi dezirus nur tion, ke ili same ne ŝparu la forton kiel mi ne avaris, se temis pri la komuna laboro por nia komuna celo. Rerigardante al la vojo, irita de mi, mi havas bedaŭron kaj doloron ne pro la dediĉitaj talento kaj energio (ho, se mi povus refoje komenci!), sed sole pro malico de la sorto, haltiganta min survoje.

Ankaŭ pravigon pri ĝistomba konvinkiĝo atestas via letero: la homa intelekto neniam rezignos pri rimedoj, servantaj al la progreso. La tempestoj de la Vivo, alternado de mondperceptoj, politikaj perturboj, militoj, kataklismoj povas malrapidigi la takton, malpliigi la vervon, eĉ haltigi la laboron de semantoj, sed ekstermi grandiozajn ideojn, kiuj kulturfaktore servas en la preparo de pli bela estonteco, ili ne kapablas. Ne grave, ke unuopuloj falas, perdas forton, eĉ pereas, ĉar ĉiam troviĝos revoriĉaj novuloj, kiuj celkonscie dediĉos sin al la konstruado. Silento de laciĝintaj aŭ mutigitaj bardoj neniam signifos, ke formortis la kanto mem, ravanta la homajn korojn; aŭtuna velko kaj vintra funebro neniam signifos, ke la printempo restos for por ĉiam. Kion neceso,

vivbezono kreis por ekzisti, tion la Vivo mem pli malpli frue kondukos al triumfo. Tia kreaĵo, vartata de la Vivo, estas nia Esperanto, ĉar neceso, vivbezono vokis ĝin por ekzisti.

Post la dua mondmilito multloke la fortoj paralizite stagnis, dronis en nenifaro. Oni senkonsile gapis en la profundan abismon, kie, kiel en fundo de tombo, kuŝas morte kaj duonmorte valoroj de civilizo, kulturo, noblaj kultoj ktp. . . . sed la Vivo ne estas venkebla . . . jen aperis labor-emaj manoj de optimistoj, jen ekagis homecaj aktivuloj por forigi la ruinojn, flankenŝovi la rubojn kaj por ekkonstrui ion novan . . . Konsolo, funebropela espero radias el la agado de tiuj novaj, junaj aktivuloj al ni, laciĝintoj, mem- kaj kontraŭvolaj nenifarantoj. Freŝenergiaj gvidantoj, novaj talentaj poetoj, poetinoj, tuta armeo nova da nekonataj soldatoj jam estas preta por transpreni la standardon kaj por helpi en la konstrua batalo al tiuj, kiuj celas internacian kunlaboron, interpopolan komprenon, reciprokan proksimigon de la diversaj nacioj. Perfekta paco, senpera interfratiĝo, racie praktika solvo de la problemo lingva ne estas eblaj sen Esperanto. Ĝi fariĝis kultur-faktoro en la historia evoluo al plua progreso. Ĝi estas la aviadilo de ideoj porĉiamaj kaj noblaj, per kiu la HOMO PRUDENTA deziras krei kontaktojn inter ĉiuj popoloj de la kvin kontinentoj. Mi estas konvinkita, ke post paso de la ĥaoso, karakterizanta ĉiun kristaligan procedon, nia lingvo kaj la kulturo kreita per ĝi havos gravan historian destinion en la vivo de la tuta homaro.

Tute certe, ke vi surprizite demandas, kiel iu povas esti samtempe tia optimista kaj tia pesimista?! Ĉiu homo senescepte. Ĉu vi ne

rimarkis, ke mia optimismo rilatas tion, kio estas ekster mi kaj la pesimisto ekparolas, kiam temas pri propra persono? Kial? Nu, kara amiko, ĉiu sezono havas siajn koloron, tonon, melodion. Mi estas ja maljuna, do ĉio, kio rilatas mian mizeran viveton vestas sin en kostumo aŭtuna kaj anstataŭ printempa susurado de la foliaro jam fajfe siblas vento inter la nudaj branĉoj. La printempo havas rajton fiere pompadi, la aŭtuno havas voĉon nur por plendi pri la forvelkiĝo. La junularo aklamas kaj tre ĝuste kaj tre bone! La maljunuloj grumblas, eble ne bone, sed prave. Lasu al ili la rajton laŭplaĉe plendi kiel vi lasas al la vento veante blovi dum la frostaj monatoj! Tia kantado, eĉ se la temo prikantas la baldaŭan foriron aŭ tedan vegetadon, tamen kaŝas konsolon: ĝi estas esperantlingva kanto, en ili, iom knare, iom krude, sonas la vortoj, sed ili tamen estas esperantaj vortoj, sonoj, kaj la tuto tamen formas tian melodion, kia sincere forflugis el la koro de maljuna esperantista poeto, kiu (ho, homa malforteco!) tro kompatas sin por resti muta... Ekzistas homoj, kiuj ŝatas la kantojn aŭtunajn... En versoj lulata doloro similas al la ploro, solvanta la spasme senlarman funebron; ĝi mildigas la suferon... Amiko, vi rajtas fermi vian animon antaŭ tia kanto kiel vi rajtas ŝtopi per fingroj viajn orelojn por ne aŭdi la ventveadon, kvankam al la simfonio

de la Vivo samrajte apartenas ne sole la junuleca revoriĉa aklamado, sed ankaŭ la morna tono de la maljunula pesimismo.

Por fini permesu aldoni koncizan respondon al oftaj intervjuaj demandoj, direktataj al mi.

La literaturo faris lingvon el la projekto kaj faris ĝin taŭga por la vivo. La esperantistaro, varbita el ĉiuj popoloj de la mondo, tamen estas nomebla popolo, ĉar ĝi havas propran, kvankam junan kulturon por la komuna bono de la homoj. La verkistoj, poetoj de nia literaturo ĉiam, do ankaŭ nun, estas sub la inspira forto, radiantaj el la lingvo mem. La neglekto de nia literaturo aŭ rezigno pri ĝia plua evoluigo senvalorigus ĉiun fortostreĉon, ĉiun sinoferan agadon, kiujn la pioniroj kaj nuntempaj verkistoj, poetoj faris. La venko de la ESPERANTA LIBRO garantias la triumfon de Esperanto. Por konsili jen: kolegaro, ŝatu, amu kaj dorlotu la verdan popolon, ne perfidu ties idealojn kaj ci, verda popolo subtenu la inspiritan laboron de viaj kulturlaborantoj.

Saluton al vi, juna amiko, akceptu bondezirojn por via vivovojo. Via pioniro-amiko




●● **Nia kovrilbildo** montras Julion Baghy en la jaro 1931. Li tiam estis kvardekjara (li naskiĝis 13 Jan., 1891). Jam verkita estis liaj poemoj *Preter la Vivo* (1922) kaj *Pilgrimo* (1926); la novelaro *Dancu Marionetoj* (1927) kaj la kolekto de noveloj, teatraĵoj kaj poemoj *Migranta Plumo* (1929); la romano *Viktimoj* (1926) kaj la romaneto *Printempo en la Aŭtuno* (1931). Ankoraŭ aperontaj estis la romanoj *Sur Sanga Tero* (daŭrigo de *Viktimoj*) kaj *Hura!*; *Verdaj Donkiĥotoj* (romano kaj karikaturaj), *La Teatra Korbo* (noveloj kaj skizoj) kaj lia tria poemaro *La Vagabondo Kantas*. Pri la ĉiam vigla kreemo de lia talento atestas la novaj poemoj sur la sekvantaj paĝoj.

Ĵulio Baghy

La Tempo Pasa

Ni, deksepjaraj

Mi plektus nun deksep narcisojn
je krono por via harar'
kaj spirus sur vin deksep kisojn
ke unu havu ĉiu jar' !
Al vi mi flustrus deksepfoje :
“Mi vin admiras, belulin' !”
se vi reflustrus deksepfoje :
“Mi ŝatas, knabo, ankaŭ vin !”

Nur ŝatas ?! Pro deksep diabloj !
Aspiras mi je multe pli !
Pri deksepoblo da afabloj
mi revas hejme sub tili'.
Vi, deksepjara junulino,
senlerne lertas en koket',
sed same lertas en intimo
mi—deksepjara junulet'.

Printempoj deksep vin ornamas,
pro vi al Dio psalmas kant' ;
en vi fandite virtoj flamas :
deksepfaceta brilant'.
Deksepkolore Vivo pompas,
se vi promenas sur la strat',
junulajn korojn deksep rompas
rideto via. Jen la fat' !

Nun deksepope sekvas dandoj
paŝetojn viajn sur bulvard',
sopiras je deksep demandoj
respondon jesan per rigard' ;
mi, inter deksep, la deksepa
kun korprofunda riverenc'
per kanto simpla, birdopepa
petegas pri la rekompenc'.

Ni, sepdekjaraj

Mi plektus dornojn kaj urtikojn
je sepdekbranĉa skurĝo nun,
per ĝi min draŝus kiel spikojn ;
min trafu sepdekfoja pun' !
Ve, sepdekoble min turmentas,
ke edzo estas sklav' sen saĝ' !
Mi estis do—aĥ, nun mi sentas—
simio nur en hejma kaĝ'.

Simio nur ?! Pro sepdek gnomoj !
Eĉ multe malpli : nur azen' !
Katenis loge min du pomoj :
printempa ĉarmo de l' eden' . . .
Mi poste spertis sepdekfoje,
min kio iam ravis plej,
delonge velkis for levkoje
kaj venas reen el—drogej'.

Ci, iĝis sperta bajadero,
ho, sepdekjara vantulin',
en ĉiu kaĉo la—kulero,
najbardamnita klaĉmaŝin' !
Mi iĝis urso, kiu grumblas,
sur kolo pendas—seba tuk',
infane plendas, ploras, stumblas
pro sepdek jaroj, pro kaduk'.

Eĉ sepdekono ne plu estas
el nia juna ama ard' ;
la kisdeziro—volo restas
pro sepdekoblo de singard'.
Ve, mankas em' por arda rito,
artikoj knaras pro la rust',
diable venkis nin artrito,
sepdekfajfile spiras Brust'.

Por vi mi deksep rozajn portos
(jarkreske ĉiam unu pli !)
kaj vin defende mi eskortos,
fidelon juras je Bibli'.
El deksep kavaliroj, kredu,
ĝistombe amos sole—mi ;
ĉe ni la kor' al koro cedu :
por ni kreitaj estas—ni.

Nun dekseponon mi ne diros
de tio, kion havas sin' ;
pri deksepoblo vi ja miros,
se al ĉi kor' vi premos vin :
deksepon lipoj multiplikos
ĝis nombri ne tre gravos plu,
en kis-obligo ni ne strikos,
forĝesos pri la tempoflu'.

Ni, deksepjaraj geamantoj,
dancante marŝos sur la voj',
nin ravos ridoj, floroj, kantoj,
mirakloj deksep de l' vivĝoj',
ĉar en ni pulsas juna sango
kaj ardas peto kun promes' . . .
Do deksepfoje al demando :
"Ĉu vi min amas ?" diru : "Jes !"

Se gastu iras ni dimance
en sepdekjaraj ŝtof', atlas',
rimarkas honte nur ĉemange :
"La dentoj restis en la glas' !"
Riproĉoj sepdek vortgalopas
kaj reciprokas la skandal' :
"Pro ĉi domaĝoj sepdekopas !"
Malsataj lasas nin regal' . . .

Ni, sepdekjaraj—turtoparo—
ŝancelas ombre sur dekliv',
forĝesis kveri pro amaro,
kverelas nur pro teda viv' :
"Ci volas pravi, ĉiam pravi ;
mi ?—sepdekfoje cedu nur !
Ah, min nenio povas savi,
eĉ eble ne la—kripta mur' . . . "

"Nu, bone, bone ! . . . Ne ploretu,
ci, mia kara stultulin' !
La larmojn viŝu . . . do, ridetu !
Ci konas ja, ci konas min . . .
ci scias, ke mia kolero
nur restas—buŝventola bru' . . .
Nu, sepdekjara bajadero,
nun kisu min kaj dormu plu !"

Poemoj de Zamenhof

Laŭ noto en numero 578/11 M. C. Butler supozas, ke Zamenhof estas aŭtoro de poemoj, aperintaj sub la plumnomo "Amiko" en "La Esperantisto", kaj en la unuaj jarkolektoj de "Lingvo Internacia".

Ne estas tiel. Paul Nylén, kiu tiam redaktis la L.I., konfirmis al mi, ke tiujn poemojn verkis A. Kofmann el Odeso. Tiun informon donis Nylén jam en 1932 al K. R. C. Sturmer, kiu ĝin publikigis en sia verko "El notlibro de praktika Esperantisto", aperinta en Budapeŝto 1934.

O. Ginz.

Dumviva Membreco

Mi fariĝis Dumviva Membro antaŭ multaj jaroj kaj pagis la kotizon, je tiu tempo £12. Intertempe la valoro de la mono malpliĝis. Konsekvence la kostoj de la administracio, la eldono de la *Revuo* kaj de la Jarlibro k.t.p. tre altiĝis. Mi opinias, ke mi nun ĝuas avantaĝon neantaŭviditan pro la ŝanĝo de la monvaloro. Leĝe ĉio estas en ordo, sed morale mi sentas honoran ŝuldon. Mi do decidis donaci al UEA la diferencon inter la sumo pagita kaj hodiaŭa kotizo por Dumviva Membreco. Eble ankaŭ aliaj volas imiti mian ekzemplon ! S. Liebeck, Cape Town.

Ho, lasu min trankvile revi !

*Ho, lasu min trankvile revi,
en lum', portata en mi, bani min,
rifuĝi for el mond', min levi
inspirflugile ĝis la kosma lim' !*

*Atendas transe senlimeco
kaj eblo por forgesi pri la ter'
por ĝui en la eterneco
collongan ŝajnon de fiktiva ver'.*

*Ho, lasu min trankvile drivi
sur fabelmar' al suna sonĝhaven',
sur transa bordo pense vivi
en lando de miraĝoj sen katen' !*

*Ĉi infanlud' ne malutilas
al vi, tre sobraj estroj de l' real' ;
en ĝi konsola trompo brilas
por la fratar' dum migro sub fatal'.*

*Ho, lasu min trankvile kanti,
cikade ĉirpi sur la vivokamp',
somerhumore salti, dandi,
formikojn ridi pro prizorga ramp' !
Ne gravas grumblo de l' stomako ;
min nutras ja nektaro, ambrozi'
kaj lulas eĉ la korvograko,
se ravas min korsorĉa iluzi'.*

*Ho, lasu min trankvile gastigi
ĉe fabla tablo en reĝpompa bril'
kaj orajn revojn verse rasti,
al senhavuloj ŝuti perlojn mil !
Mizeron bardan Muzo kaŝas
nebulvuale sur stelpolva voj' ;
dum mi kantante migre paŝas,
ne ĝenas dornopik', nek hunda boj'.*

*Ho, lasu . . . Petoj vane spitas ;
pro propra voĉ' nun surdas ĉiu di',
blinduloj la vidantojn gvidas
en ĉi burleska farsa tragedi',
kaj homa digno, mi jam scias,
nur vipe servas en la sanga pel' ;
pri ĝi la sklavo fantazias,
en ĝia nom' li murdas dum ribel'.*

Julio Baghy

Ĉe la mondfama biblioteko Arhigimnazio de Bologna estis fondita sekcio Esperanta.

Okaze de nia grava kongreso Jubilea Universala estus ŝatata pruvo de kora simpatio por nia propagando donacoj de libroj al dirita biblioteko.

Precipe estas espereble ke tiujn donacojn oferu aŭtoro kaj eldonistoj : tio utilas al ili mem, ĉar tiel la verkoj estos konataj de legantoj kaj de ĉiuj, kiuj vizitos la bibliotekon.

Oni povas sendi librojn por la biblioteko pere de S-ro Raffaele Bagnulo, Via Guidicini 5, Bologna.

Alvoko, precipe al la esperanta instruistaro, por kultura ekspozicio okaze de la Universala Jubilea Kongreso.

Estas petataj : desegnaĵoj kaj pentraĵoj de geknaboj (ok- ĝis dekkvarjaraj). Verkaĵoj dimensiu de dudekkvin ĝis tridek kvin centimetroj ĉiu latero.

En ĉiu verkaĵo oni lasu spaceton liberan, en kiu oni skribu nomon, antaŭnomon, naciecon, adreson kaj aĝon de la aŭtoro. Plie oni aldonu tie jenajn demandojn al la aŭtoroj kaj iliajn respondojn :

“Vi preferas :

“kian ludon, kaj kial ?

“kian ludilon, kaj kial ?

“kiajn librojn (de kia speco), kaj kial ?

“Kian profesion, plenkreska, vi volus praktiki, kaj kial ?”

La plej bonaj kaj interesaj verkaĵoj estos premiataj.

Kolekto de tiu materialo celas studojn psikologiajn kaj pedagogiajn ĉe Bolonja Universitato ; tial estos tre altvalora, kiel sperto de utiligo de esperanto, laŭ rezolucio de Unesko.

Sendu al R. Bagnulo, adreso supre.

LABORO KAJ SUKCESO

Post la raporto pri la organizo kaj labormetodoj de Norvega Esperantista Ligo en la pasinta numero, sekvas nun kiel dua en serio jena studo pri laboroj de JUGOSLAVIA ESPERANTO-FEDERACIO, el la plumo de ties Prezidanto, S-ro Peter Zlatnar.

ROLO de objektivaj kaj subjektivaj fortoj. Kvankam la ĝeneralaj objektivaj kondiĉoj por nia agado estas relative tre favoraj, tamen en konkreta ĉiutaga laboro ni devas fronti plej diversajn malfacilaĵojn: konatan antaŭjuĝon pri Esperanto pro nesufiĉa informiteco de publiko, kontraŭstaron de intelektularo, grandan okupitecon kun internaj memadministraciaj problemoj sur stata, ekonomia, sociala kaj kultura sektoroj, kaj finfine postulemon de nia movado rilate al kapabloj kaj sinoferoj.

Se ni deziras kompari objektivajn kondiĉojn kun disponeblaj subjektivaj fortoj por plenumo de laboro, kiu grandiĝas antaŭ ni laŭ vastaj eblecoj de ĉiu-flanka aktiveco, ni devas konstati egajn mankojn en nia movado precipe de subjektiva karaktero—nekonforma socia konsisto de nia anaro, nia malforto inter instruistaro, societa kaj individua izoleco el publika vivo—sekve sektismo kaj memkontentiĝo paralizas kaj bremsas ankoraŭ nian laboron. Finfine, la ĝenerala nivelo de Esperantomovado en la mondo starigas la plafonon ankaŭ por opaj landoj, kiuj ankaŭ sub plej favoraj kondiĉoj ne povus longdaŭre superi ĝin—ni ja estas internacie kondiĉita movado.

Paroli pri ĉiuj ĉi malfacilaĵoj signifas, ke ni konas ilin, kaj ke ni kontraŭ ili ankaŭ direktas nian batalon. La sukcesoj ne estas grandaj, tamen ni tendencas al konstanta progreso.

Esperanto-movado fariĝas parto de ĝenerala kulturkleriga agado. La laborplanoj de niaj esperantaj organizoj renkontis larĝan komprenon kun sekvanta morala kaj se necese ankaŭ materiala subtenoj flanke de plej diversaj kulturaj, politikaj kaj ankaŭ ŝtataj instancoj konforme al la karaktero de laboro farota (subvencioj por eldona agado, budĝetoj, organizo de kongresoj, vizitado al internaciaj renkontiĝoj). Aliflanke la laborplanoj havigis al nia movado aktualan karakteron, kiu donas al ĝi novajn impulsojn, ĉiam pli plenigas nian movadon per nova spirito, kiu inspiras la homojn agi konforme al niaj idealoj.

La kultura karaktero de nia movado envicigas nin inter la kulturklerigajn organizaĵojn, kie ni trovis ankaŭ egalrajtan pozicion same kiel aliaj tiakarakteraj organizaĵoj. Ĉar kulturkleriga laboro en nia lando estas ŝtate subvenciata, ankaŭ nia movado ĝuas la saman subtenon, se per sia agado pruvus tian karakteron.

Ekkoninte la supran karakteron de nia movado, vi povos ankaŭ pli kompreni ke kontakto kun niaj eminentuloj ĝis la Prezidanto Tito mem, sur tia bazo, estas tre facila, ĉar ligas nin la sama laborprogramo, nur sur diversaj sektoroj kaj laŭ diversaj metodoj (uzo de Esperanto). Ankaŭ la sinteno de gazetaro kaj radio, se ni tenas nin en la kadro de supra programo, estas tre komprenema kaj eĉ sugestis al ni pli larĝan kunlaboron. Sub tiaj kondiĉoj niaj

prelegistoj prelegas en Popola Universitato pri niaj temoj kaj estas pagataj. Popolaj Universitatoj enmetas proprainiciate aŭ laŭ proponoj de lokaj esperantistoj en sian programon de instruado ankaŭ Esperanton; se ni disponas taŭgajn instruistojn en lernejoj, Esperanto estas fakultative instruata kaj la instruanto honorariata de lerneja instanco.

Ni spertis, ke personaj kontaktoj kaj laboro de lokaj grupoj estas plej efikaj. Ankaŭ ni konstatis, ke per koresponda kurso ni povis enpenetri en la lokojn, kie ni neniam havis esperantistojn kaj pere de tia kurso la Ligo povas senpere helpi al unuopuloj kaj al grupoj, kie oni ne disponas kapablan kursgvidanton.

Tutlanda aktiveco. Por atingi pli racian laboron en la diversaj sektoroj de nia enlanda movado, ni en januaro 1955 decidis starigi kelkajn komisionojn, el kiuj la ĉefaj estas:—

Lingva Komisiono (LK). Respondekas pri ĝi *Kroatia Esperanto-Ligo*.

LK zorgas pri:

1. lernolibroj kaj vortaroj,
2. fondo de Esperanto-institutoj,
3. fondo—laŭ ekzemplo de Zagreb—de lektoratoj ĉe la universitatoj,
4. enkonduko de Esperanto-instruado, precipe en instruistaj seminarioj,
5. akordo por enkonduki Esperanto-instruadon en lernejoj ĝenerale.

Komisiono por kultura kunlaboro (KKK). Respondekas *Serbia Esperanto-Ligo*.

Taskoj:

1. plivastigi kulturajn kontaktojn kaj kunlaboron kun aliaj popoloj laŭ la principoj de UNO,
2. instigi al vasta aktivigado de esperantistoj sur agadkampo de praktika aplikado de Esperanto en esperantistaj kaj precipe analogaj neesperantistaj organizoj kaj institucioj,
3. prepari bazon por konvencio inter la POR-ŜTATOJ kaj aliaj por enkonduko de Esperanto en lernejoj kaj en kulturaj interŝanĝoj ĝenerale,
4. koordini la enlandan eldonan agadon.
5. pere de siaj kunlaborantaj organizoj kaj rekte kunlabori kun: Nacia Unesko-komisiono, Socialista asocio, Sindikatoj, Popolaj universitatoj, Fakaj organizoj, Porinfanaj organizoj, Turismaj organizoj, Radio-stacioj k.a.

Buroo por Informado kaj Dokumentado (BID). Respondekas *Kroatia Esperanto-Ligo*.

Taskoj:

1. agi konforme al CED de UEA,
2. kolekti informojn kaj dokumentojn pri esperantista movado en Jugoslavio,
3. statistiki kaj analizi ricevitajn informojn,
4. eldoni la Informan Bultenon en serbokroata lingvo por enlanda gazetara servo pri novaĵoj en la esperantista movado,
5. arkivi interŝanĝe ricevitajn alilandajn gazetojn kaj publik-aĵojn.

Iom pri la financoj. Nia federacio direktis peton al la Federacia registaro pri subvencio de Din. 2,020,000.—.

Kiaj programoj ? Kia agado ?

EN la somero de 1954 okazis en Helsingør, Danlando, konferenco pri la laboro de lokaj grupoj kaj landaj asocioj. Dum la kunsidoj esprimiĝis diversaj sugestoj kaj opinioj, kiuj sendube havas intereson kaj utilon por la gvidantoj de niaj grupoj kaj landaj asocioj, kaj pro tio ili meritas pli vastan diskonigon.

La Konferencanoj unue diskutis la respondecon pri grupprogramoj, ĉu aranĝu ĝin unu persono, kutime la sekretario, aŭ pluraj, ekz. programkomitato. Okazas ofte specialaj aranĝoj kiel Zamenhofa vespero, festvespero, debato, teatraĵeto, k.c. kiuj bezonas multe da antaŭpreparo, kaj por ne tro ŝargi unu personon, la preparo de tiaj specialaj okazoj estu transdonata al malgranda komitato.

Ĉu antaŭaranĝi la programon por la tuta sezono, aŭ almenaŭ por la vintraj monatoj ? Jen alia demando diskutita de la konferencanoj. La plimulto opiniis ke oni devas prepari programon iom elastan, kiu lasos liberajn lokojn por neatenditaj okazoj, ekzemple, vizito de eksterlanda Esperantisto. Sed oni devas almenaŭ iom plani la programon, ĉar hazarda programo ne daŭre tenos la intereson de la klubanoj.

La enhavo de programo grandmezure dependas de la konsisto kaj fortoco de la grupo. Ĉu prelegoj okazu ĉiun grupvesperon, aŭ nur de tempo al tempo ? Unu el la fortaj italaj grupoj aranĝas unu elstaran prelegon en ĉiu monato, prelegon de bonekonata persono, kiu samtempe estas spertulo

DEBATKONKURSO en Bolonjo. La temo ĉijare estas “La idealoj de la junularo” kun subtitolo “Ĉu nuntempe estas spirita krizo?” Reguloj kiel kutime (vd. Majo 1954, p. 145).

Al la budĝetpropono estis aldonita programo de nia Federacio por 1955 kaj klarigoj al tiu programo.

Serbia Esperanto-Ligo faris pet-skribon al la Federacia registaro pri la permeso aranĝi loterion kun la rajto disvendi la loteribiletojn en tuta Jugoslavio. La enspezoj de la loterio estos destinitaj por konstruo de esperanto-hejmo en Beograd.

Kluba laboro. Preskaŭ ĉiuj societoj organizas unufoje en semajno societajn kunvenojn kun programo konsistanta el prelegoj, referaĵoj, vivaj gazetoj, amuzvesperoj, film-prezentadoj k.a. La nivelo kompreneble ne ĉiam kontentigas, ĉar ĝi

dependas de disponeblaj fortoj. Informado de societanoj okazas pere de societaj informiloj aŭ pere de la loka gazetaro. La propagando por la kursoj estas farata per afiŝoj, gazetoj kaj radio. Ekster la societa influo estas gvidataj kursoj laŭ deziro propra en diversaj lernejoj, liceoj, sindikatoj, entreprenoj aŭ apartaj organizaĵoj.

La problemoj de la societoj estas kontentige solvitaj preskaŭ ĉie. Se la societo ne havas propran ejon, ili gastigas ĉe iu alia kulturkleriga societo aŭ sindikato kontraŭ eta lupago aŭ tute senpage.

Zlatnar Peter

pri sia temo. Sed ne ĉiu grupo disponas pri tiom da talento, do oni devas serĉi aliajn vojojn. En iu norvega grupo la gvidanto montras, per projekcia aparato, tri diversajn bildojn, kiujn li priparolas, samtempe instruante vortojn kaj esprimojn. En la sekvanta kunveno li utiligas multajn el la samaj vortoj kaj esprimoj por priparoli tri aliajn bildojn, metodo multŝatata de la klubanoj.

Ĉu niaj samideanoj estas leganta popolo? Pri tio oni foje devas dubi. En ĉiu grupo troviĝu biblioteko, ne por ornamo sed por ofta uzado fare de la klubanoj. Por aranĝi literaturan vesperon, bazitan sur la enhavo de la grupa biblioteko, dum unu vespero la membroj elektu libron kaj poste legu ĝin. En sekvonta vespero priskribo de la enhavo de la legita verko donos al la aliaj membroj ne nur novan informon sed ankaŭ instigon al plua legado de Esperanta literaturo. Se en la klub-biblioteko troviĝas kelkaj kantlibroj, la grupo havas la eblecon okazigi feliĉajn muzikvesperojn.

Alia sugesto estis ke grupo abonu Esperantan gazeton de alia lando. Se oni kombinus tiun sugeston kun kontaktoj, per leteroj aŭ per vizitoj, kun la Esperantistoj en tiu lando, tio certe aldonus al la intereso kaj spertoj de la grupanoj. En nia movado ofte mankas tiu intima kontakto inter grupoj kaj landoj.


Dum unu kunsido de la konferenco oni metis antaŭ la anoj la taskon prepari grupprogramon por tuta sezono. La unua temo, kiu troviĝis sur tiu provizora programo, estis "Someraj travivaĵoj", kaj la lasta "Ekskurso". La enhavo estis tute varia, kaj inkluzivis prelegojn,

muzikan vesperon kaj skeĉojn.* Sed tiu provizora programo estis aranĝita por nur ok monatoj. Kion pri la aliaj, la someraj monatoj? Se grupo dormas dum la somero, eble kelkaj membroj forgesos vekiĝi en la komenco de la venonta vintra sezono. Dum la somero, iamaniere, en formala aŭ neformala kunveno, oni devas kunteni la klubanojn kaj paroligi ilin. Cetere, en la menciita provizora programo oni aranĝis grupkunvenon dufoje en ĉiu monato. Sed ĉu tio sufiĉas por doni la necesan praktikon kaj instigon al la membroj? Pri-pensinda sugesto por helpi la novulojn estis, ke iu spertulo venu al la kunvenejo duonhoron antaŭ la kutima horo por ekzerci la novulojn, kiujn la grupo nepre devas flegi.

Ankaŭ pri novaj kursoj la konferencanoj diskutis, kaj konstatis, ke ekzistas du varbmetodoj, la persona kaj la teknika, el kiuj la persona estas pli efika. Se oni havas alilandan Esperantist(in)on, uzu ties propagandan valoron, ekzemple per intervjuoj en la lokaj gazetoj. Inter la teknikaj rimedoj sugestitaj por la starigo de kursoj troviĝis la aperigo de afiŝoj en vendejoj, montrofenestroj, kafejoj kaj fervojaj stacidomoj. En la gazetoj aperu, antaŭ la kursanoncoj, informaj artikoloj pri Esperanto. Se la grupo deziras malfermi la sezonon per publika kunveno, ĝi dividu tiun aranĝon en du partojn—en la unua, parolado pri Esperanto, en la dua, provleciono. Se ekzistas migranta Esperanto-ekspozicio en la lando, ĝi ankaŭ aperu en la unua kunveno. Oni ne forgesu propagandi en junularaj rondoj, ankaŭ inter fakaj kaj kulturaj organizaĵoj.

Kiam la kursanoj fariĝu klub-membroj? Jen alia demando antaŭ

* *skeĉo* = *teatraĵeto*



Esperantista Vivo



Nekrologo

Al parencoj kaj amikoj de jenaj forpasintaj samideanoj ni esprimas nian koran kondolencon.

Naskiĝis

Faux. Je la 1-a de Marto, 1955, al ges-anoj Margaret (antaŭe Bone) kaj Derrick Faux, el Bridgnorth, Anglujo, filo Conrad Stanley, frato por 3-jara Joy kaj 18-monata Daniel.

Nicolai. Al ges. Peter kaj Madeleine Nicolai (antaŭe Guillard), je la 11-a de Marto 1955, filino Marianne, fratino por Ingrid, en Saarlouis, Choisy-Ring, Sarlando.

Kvist. Al ges. V. Kvist kaj R. Kvist-Weller el Herning, Danlando, la 9-an de Feb., filino Grethe Johanna.

Jubileas

Koller. Je la 9-a de Marto, 1955, festis Karl Koller el Solbad Hall, Tirol, sian 70-jaran naskiĝtagon. Nia senlaca veterano Koller estas esperantisto jam el sia studenta tempo en 1908. Gratulon!

Broughton. F-ino Florence Eleanor Broughton el Kingston-on-Thames, Anglujo, la 13-a de Marto, aĝo 77.

Castiglione. Post longa malsano forpasis Pierino Castiglione 50-jara. Li estis kasisto kaj administranto de I.E.F. kaj en 1930, apenaŭ 23-jara, li organizis la landan kongreson en Como. Al lia familio ni etendas nian koran bedaŭron.

Gérard. Je 27.II.55, nia Honora Membro F-ino G. Gérard en Loches, Francujo, 82-jara.

Jakobsen. Je la 18 Marto mortis, post 3-semajna malsano, Ing. L. Jakobsen en aĝo de 58 jaroj. Post la lasta milito li fariĝis ĉefdelegito kaj faris por UEA ampleksan laboron. Antaŭ 1 1/4 jaroj li devis rezigni tiun laboron pro neforta sanstato.

Profunde ni sentas kun S-ino Jakobsen (naskita Kingma), kiu tiel frue perdis sian edzon, kaj kun la du malgrandaj knaboj kvar- kaj du-jara.

L.F.


la konferencanoj. Por eviti perdiĝon de anoj inter la kurso kaj la aliĝo al la klubo ekzistas almenaŭ tri diversaj metodoj, nome (a) aliĝo al la kurso kaj klubo samtempe, pli facile farebla se la kurso okazas en la grupejo, (b) aliĝo tuj post la fino de la kurso, kaj (c) kompromiso—provizora kaj senpaga membreco dum almenaŭ tri monatoj.

La supra resumo temas nur pri la unua parto de la konferenca programo. Por la studado de la dua parto, la laboro de landaj asocioj, Norvega Esperantista Ligo metis je la dispono de la anoj diversajn dokumentojn, slipoj, blankedojn, k.c., kiujn dum jaroj N.E.L. mem trovis utilaj, kaj

kiuj certe havas intereson por gvidantoj de aliaj landaj asocioj. En la raporto pri la konferenco aperas la afabla anonco, "N.E.L. estas preta sendi donace aŭ interŝanĝe, specimenojn de la diversaj administraj k.t.p. paperoj, kiujn ĝi uzas, al aliaj landaj asocioj, kiuj interesiĝas pri tio. Ĉar la plej multaj el la tekstoj estas en norvega lingvo, necesos aldoni detalajn klarigojn aŭ partajn tradukojn. Tial oni petas ke nur seriozaj interesiĝantoj petu tiun materialon".

Jes, efektive tre utila konferenco en Helsingør! Oni intencas aranĝi duan similan en la somero de 1955.

David Kennedy



Nia Forumo

Ni invitas la legantojn paroli libere pri temoj, kiuj interesas ilin.
Tro longajn leterojn ni eble iom koncizigos.

Statuto de U.E.A.

Mi deziras kritiki kelkajn punktojn, kaj faras tion laŭ la nomitaj rubrikoj :

En sekcio II oni konstatas, ke ĉiu honorinda persono povas esti membro. Kiu decidas la honorindecon? En 1948, Del., Ĉefdel., aŭ Ĝenerala Sekretario rajtas **malakcepti**. Rilate "apogantojn", ne estas dirite, ke ili ne estas membroj, kvankam oni aldonas, ke ili havas neniajn rajtojn. En V, eksigo povas okazi laŭ decido de la Estraro, en 1948 laŭ komitat-decido. Tre grava afero, kaj la Estraro estas malgranda grupo. En sekcio VI, mi ne povas trovi, kiu nomas delegitojn. Kiuj estas la devoj de la Ĉefdelegito, kaj kiu nomas lin? Ankaŭ gravaj punktoj.

En Sekcio VII, mi opinias, ke kvarono de komitato estas multe tro granda proporcio por alelektitaj C-komitatanoj. Oni bezonas ilin pro sperteco, kaj tio ne estas nombra afero.

En Sekcio VIII, par. 30, kiu pritraktas funkciojn, proponas kaj ankaŭ ellasas gravajn aferojn. La nova ofico, Ĝenerala Sekretario, difinas devojn, kiuj postulas tiom da tempo, ke tiu, kiu plenumas ilin devas dediĉi sin preskaŭ tuttempe al la laboro, kaj esti en la proksimeco de la Centra Oficejo, por esti en konstanta interrilatado kun la oficistoj tie. Li efektive estras ĝin. Kian kompenson oni antaŭvidas? Ĉu £100 ĝis £300? Se jes, tiu persono dependas de la

Movado por vivrimedoj, kaj, do ricevas salajron, ne gravas pri la nomo de la pago. Reklamo en *Esperanto* por eventuala Administranto proponis £40 monate? Ne tre granda sumo por tiom da laboro. De kie oni trovas kroman monon. Kiel trovi taŭgan personon **ĉiun trian jaron**. La laboro de la Ĝenerala Sekretario, laŭ la detaloj de la propono postulas daŭran, salajritan laboron.

En Sekcio XI, oni pritraktas la Centran Oficejon. La statuto de 1948 donas al la Centra Oficejo pli da digno kaj sendependeco, kiu laŭ mi estas esenca, ĉar je la sukceso de la C.O. kaj ĝia efikeco dependas la vivo de la Asocio.

En Sekcio XII, mi scivolas, kio okazas rilate la konservon de valoraj dokumentoj k.t.p. en la arkivejo de Ĝenevo?

En Sekcio XIV, oni proponas, ke du trionoj de la esprimitaj voĉoj necesas por ŝanĝi la Statuton. Konsiderante, la fakton, ke la nuna proporcio estas respondeca por la nuna decidiĝo, mi subtenas tiun.

Violet C. Nixon, Birmingham

Respondo de Komitatano Jan Strönne :

La Komitato de UEA akceptis la principon, ke la statuto ne enhavu tro multe da detaloj, ekz. pri la elekto de ĉefdel., del. k.t.p. Kompletaj informoj troviĝas en la Ĝenerala Regularo.

Laŭ la tradicio Komitatanoj A kaj B povas—sed ne devas—alelekti Komitatanojn ĝis unu kvarono de sia nombro. Ĝis nun oni ne konstatis malbonan efikon de tiu regulo.

La Komitato trovis, ke la financa kapablo de UEA permesas al ni pagi nur modestan kompenson al kvalifikita persono, kiu regule dediĉu certan parton de la labortago al organizaĵoj kaj informaj aferoj de nia asocio. En Svedlando ni jam dum jardekoj aplikis tiun sistemon, ke estrarano povas ricevi etan regulan kompenson por sia laboro, kaj ni neniam trovis iujn malavantaĝojn.

La pliaktivigo de la asocio en la lastaj jaroj ekster la kadro de la Centra Oficejo necesigas laŭ nia kompreno plej intiman kunlaboron—kaj ne memstarecon—inter C.O. kaj la Estraro (=Prez., Vicprez., Ĝenerala Sekr., kaj la aliaj estroj de diversaj fakoj).

Jan Strönnne

Internacia Konkurso 1955

Stato je la 31a de marto

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Izraelo ..	250	260	104.0
2. Japanujo ..	900	910	101.1
3. Finnlando ..	2500	2410	96.4
4. Germanujo ..	3700	3530	95.4
5. Urugvajo ..	300	280	93.3
6. Kanado ..	350	315	90.0
7. Francujo ..	5100	4565	89.5
8. Aŭstralio ..	1000	885	88.5
9. Svislando ..	1600	1415	88.4
10. Nederlando ..	4600	3965	86.2
11. Hispanujo ..	1600	1375	85.9
12. Jugoslavujo ..	1750	1415	80.9
13. Britujo ..	9200	7043	76.6
14. Svedujo ..	5900	4490	76.1
15. Usono ..	2300	1725	75.0
16. Portugalujo ..	500	345	69.0
17. Sarlando ..	250	170	68.0
18. Aŭstrujo ..	1200	800	66.6
19. Meksikio ..	250	160	64.0
20. Danlando ..	2500	1440	57.6
21. Norvegujo ..	2200	1265	57.5
22. Italujo ..	2900	1660	57.2
23. Islando ..	350	185	52.9

DONACOJ AL CED

	£	ŝ.	p.
Stato de la 8-a de Marto ..	49	7	8
S-ro Prud'hon, Francujo ..	3	0	0
Prof. F. I. Belinfante, Usono ..		18	2
Grupo en Angers, Francujo ..	3	0	0
Roterdamaj Esperantistoj, Nederlando ..	5	10	0
Melbourne Esperanto-Klubo, Aŭstralio ..	4	0	0
S-ro H. Groendijk, Nederlando ..		9	0
S-ro E. P. Crabtree, Britujo ..		10	0
S-ro J. R. Pfanner, Sieraleono ..	6	0	0
S-ro H. de Jong, Sudafriko ..		5	0
S-ro U. Stoppoloni, Italujo ..		9	9


Stato la 7-an de Aprilo 1955 £73 9 7

Krom tio la Nederlanda Esperantistaro, pere de la landa Asocio L.E.E.N., donacis al CED la sumon de 500 guldenoj (proksimume £50) kaj la Frisa Esperantista Rondo en Leeuwarden la sumon de 25 guldenoj (proksimume £2 10ŝ. 0p.). En la akompana letero de S-ro H. J. Blokker, Prezidanto de L.E.E.N., estas interalie dirite: "Por esprimi nian dankon, ni donacas al CED . . . la sumon de gld. 500 esperante ke via oficejo povos fruktodone daŭrigi sian gravan por-esperantan laboron."

Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Britujo, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 rue de Chabrol, Paris X, Francujo, aŭ al CED mem.

Helpu la agadon en Hungarujo sendante donace uzitajn pm. bildafiŝojn en ia ajn lingvo, esp. prospektojn, ne novajn gazeton-rojn, libretojn. Pál Balkányi, Budapest 54, M. Nemzeti Bank Fiókiroda. Pardonu, se ne venos respondo !

24. Maroko ..	750	365	48.7
25. Kubo ..	250	120	48.0
26. Sudafriko ..	350	155	44.3
27. Brazilo ..	6400	2690	42.0
28. Novzelando ..	800	310	38.7
29. Irlando ..	250	90	36.0
30. Belgujo ..	2100	688	32.8



Novaj Libroj

Duope ricevatajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevatajn ni nur mencias.

* = *ricevebla de U.E.A.*

Vocabolario Italiano-Esperanto de Corrado Grazzini. Eld. Paolet, San Vito al Tagliamento ; 16 × 12 cm., 206 paĝoj broŝ., 580 it. liroj aŭ 7ŝ. 3p.

La meritplena eldonisto, A. Paolet, kiu antaŭ ne longe estis honorata de la Prezidanto de la Itala Respubliko per la titolo de "kavaliro", ĝuste pro esperantistaj meritoj, liveris al la itala samideanaro verkon, kies mankon tre multe oni sentis. Fakte, jam de antaŭ la milito estis elĉerpitaj ĉiuj itala-esperantaj vortaroj. Ĉi tiu, kompilita kun speciala kompetenteco de la Direktoro de la Itala Esperanto-Instituto, kvankam ne multe ampleksa, tamen kontentige respondas al la postuloj de la ordinara vivo. La entenataj vortoj estas elektitaj tiamaniere, ke kun iom da sperto per ili oni trovas gvidon al la traduko de multaj aliaj derivaĵoj kaj sinonimoj. La abunda frazaro igas la vortaron tre valora precipe por la lernantoj. Pro la supraj ecoj ĝi plene taŭgas por la komuna uzado.

L.M.

Corso di Esperanto. E. Barana kaj T. Tesini. Eldonis Liberia Fratelli Moreschi, Mantova. 202 paĝoj, kun plurkolora kovrilo. Prezo 600 liroj.

Kion ni scias pri la tekniko instrui Esperanton? La respondo sendube interesos la aŭtorinojn de la supra verko.

(a) Ni scias, ke certaj vortoj okazas pli ofte ol aliaj en normalaj Esperantaj tekstoj, kaj sekve oni devus instrui tiujn vortojn unue.

En 1927 aperis en la libro *Kvardek Jaroj vortstatistiko* de kolektivo sub S. Rublov.

Oni prenis grandan sekcon tra nia literaturo — originala, tradukita kaj gazeta — kaj registris la oftecon de ĉiu radikoj, primara vorto kaj afikso. El tio oni prezentis listojn de vortoj pli kaj malpli ofte ripetiĝantaj. Statistikojn — sur iom aliaj principoj — faris poste Stancliffe kaj (en *Esperantologio* n-ro 2, 1950) Leo Blaas. Sekve ŝajnas nun aksiomo, ke **hodiaŭaj verkantoj de lernolibroj devus, helpe de tiuj tabeloj, prezenti unuavice vortojn kun plej granda ofteco**, ĉar akirinte ilin, la lernanto poste ilin retrovos dissemataj tra novaj tekstoj kiel lumaj punktoj, kiuj tragvidas la komprenon kaj ofte ebligas diveni la novajn vortojn intere.

(b) Ni scias, ke ekzistas jam ne unu, sed pluraj libraj instrumentoj, nome (1) la didakte gramatika, kiu prezentas la gramatikajn punktojn kun *postaj* ekzemploj; (2) la konversacia, kiu donas unue vivajn frazojn, kaj poste ekstraktas el ili la gramatikan instruon; (3) la metodo bazita sur kontinua rakonto; (4) la bildmetodo, k.t.p. **La unua estas la plej tradicia, sed hodiaŭ ne plu la plej efika ĉe la ĝenerala uzo.**

(c) Ni scias, ke grava devo de lernolibro estas kutimigi la leganton poiom al pli longaj tekstoj por kulturi la kontinuan atenton, kaj ke **tion oni devas fari grade tra la skemo, ne sole en aldonita "literatura" suplemento.**

(ĉ) Ni scias, ke **nia lingvo dum 68 jaroj disvolvis maturan literaturon — precipe originalan — el kiu oni havas vastan elekton de pecoj ĉarmaj, belaj, absorbe interesaj.** Ni ankaŭ scias, ke facileco de legado dependas pli de la intereseco de la temo, ol de la elementeco de la lingva formo. Kaj estas kultura respondeco de ĉia instru-metodo, kiu transiras la unuan stadion, doni inicon en nian literaturon.

Sen atento al la supraj principoj, oni povas ja verki lernolibron, eĉ lernolibron el kiu oni povas akiri la elementojn de Esperanto, sed ne lernolibron plej taŭgan kaj efikan.

Kaj se mi aldonas, ke la du aŭtorinoj de *Corso di Esperanto* ŝajne ne konas eĉ unu el tiuj principoj, oni tuj komprenas, ke ilia


lernolibro estas iom malpli trafa, ol povus esti . . .

La ekzempligaj frazoj ripetadas banalan rondon de vortoj anstataŭ vere fundamenti la vortaron de la lernanto. Oni uzis didaktan gramatikan metodon, sed sen scienca, laŭgrava ordo de la materialo. Oni ja donas grade pli longajn tekstojn, sed nur en suplemento komenciĝanta sur p. 93. Kaj la literatura parto, krom kelkaj pecoj el Fundamenta Krestomatio, konsistas el ekzemploj, tradukitaj kaj originalaj, "el la itala verkado"—kvazaŭ Esperanto estus lingvo nacia, kvazaŭ ni ne havus la tutan mondon el kiu ĉerpi . . . (Interese, ke al la itala verkado oni atribuas *Colomba* de Merimée, en traduko de Beau !). Kaj eĉ sub tiu limo oni ne elektis la plej bonajn verkojn. Kie estas Musella ? la poemoj de Azzi kaj Minnaja ? Pli grave : Kial mankas ĉerpo el la *Infero*-traduko de Kalocsay ? *La bovo* de Carducci, *La senfino* de Leopardi k.a. en la superbaj tradukoj de tiu sama ? Kial oni prezentas *La sabato de l' vilaĝo* en indiferenta, senrima traduko, anstataŭ en la bonega kaloĉaja ?

Pri kelkaj instruataj strangaĵoj : la formo *italano*, la frazo *Mi renkontis mian amikininon riĉa* por ekzemplo de predikativo k.a., ankaŭ pri pluraj verŝajne preseraroj, estas neinde nun paroli detale.

Kutime, ĉe libro eldonita je konsiderinda kosto, oni ĝentile domaĝas gravan kritikadon. Sed ĝuste ĉar niaj rimedoj estas malvastaj, ni des pli devas uzi ilin ekonomie kaj kiel eble plej bone. Kaj necesas almenaŭ unu fojon tion diri. Nur estas malfeliĉo, ke mia kritiko falas hazarde sur libron, kiu estas nek pli bona, nek pli malbona, ol diversaj aliaj.

R.R.



La Infanoj de la Mondo. Gazet-formata, bildhava informilo 16-paĝa (la lastaj 2 en angla lingvo sur la eldono, kiu nin atingas), aperas dumonate. 2 ekz. por 1 rkp., ĉe Infana Fakto de Heibonsya, Yonbantyo, Tiyodaku, TOKIO ; jarabono 3 rkp.

Temas pri la plano de la granda eldonejo Heibonsya, eldoni mond-geografion de infanoj, por infanoj : aperis la Japanlanda, presiĝas nun la Francuja, sekvos la Angluja k.c. (vd. Jan. n-ron, p. 6).

Nia Voĉeto No. 3. Geknaba Bulteno. 4-foje dum jaro. 21 × 15 cm. 18 paĝoj multobligitaj. Jarabono 120 fr. fr., k.s. havebla ĉe landaj S.A.T. perantoj.

Jen promesplena multe bezonata gazeto por junaj Esperantistoj ĝis 15-jaraj. La simpla kovrilo, kun elstara desegno, nigra kaj verda sur blanka fono, allogas.

La enhavo ampleksas la programon de la 2-a Geknaba Kongreso en Linz ĉi jare ; diversnivelaĵoj rakontojn, kun vere taŭgaj temoj ; eron el la aventuroj de Onklo Ben (bonega ideo) ; angulon de la Naturo ; anoncetojn de geknaboj por geknaboj kaj klarigojn kun bildoj por manfarotaĵoj. La tuto estas amuze ilustrita per bildetoj, kiuj donos ĝojon al multaj, eĉ plenaĝuloj.

V.C.N.



(Ej, kion vi faras ĉi tie, Fiŝa Moŝto ?)

—Nu, ververe mi estis destinita por la vosto de la artikolo **La Prezidanto fiŝkaptas kaj meditas** sur p. 139, sed tiu fiŝofuŝa helpredaktoro mistaksis la spacon kaj mi estas elĵetita ĉi tien. Sed tju ! ne malhelpu min.—*Elitaj samideanoj, mia hodiaŭa temo estas . . .*

*Belarta Konkurso 1954 : Premiita Dramo***KORESPONDU !**de **Antoni Seemann***Komedieto en unu akto***Personoj :**• *Henri**Pierre, ilia amiko**Lise, lia edzino**Inéz**Okazas en Parizo nuntempe.**Pierre* : Ĉu vi estis hieraŭ en la klubo ?*Henri* : Jes.*Pierre* : Kiel plaĉis al vi mia prelego ?
Ĉu vi komprenis bone ?*Henri* : Jes, jes.*Lise* : Ne mensogu. (*al Pierre*) Mi devis traduki al li ĉiun trian vorton.*Henri* : Tio ne estas vera. Mi komprenis bone, nur ion mi ne sciis certe.*Pierre* : Vi devas pli multe paroli. Paroli, paroli kaj nur paroli. Tiel vi lernos plej bone. Ĉu vi komprenas ?*Henri* : Jes. Mi volas multe paroli. Mi lernas kaj lernas, sed mi konas ĉiam nur malmulte. Mi ne scias, ĉu mi iam ellernos Esperanton bone.*Pierre* : Vi ja scias jam sufiĉe—post tiom mallonga tempo. Via edzino estas eminenta instruistino.*Lise* : Nu, estis ja ankaŭ sufiĉe granda laboro por mi, persvadi lin, ke li lernu Esperanton. Kaj ĉu vi scias, kio kaŭzis, ke li tamen komencis ? Lia ĵaluzo. Li volis kompreni, kion mi parolas kun la samideanoj.*Henri* : Tio ne estas vera.*Pierre* : Nu vidu, kiel bone vi komprenas. Nur se vi volas.*Henri* : Mi devas kompreni, ĉar Lise ne donus al mi vespermangon.*Pierre* : Kion vi diras ? Espereble Lise ne torturas vin per malsato pro Esperanto ?*Lise* : Estis li mem, kiu ekhavis ĉi ideon tuj, kiam li komencis lerni. Nome li decidiĝis, ke ni parolos ĉiutage unu horon nur esperante. Tiel okazis kutime antaŭ vespermango — kaj Henri devis diri esperante, kion li deziras vespermangi. Mi prezentis al li ĉion, pri kio li petis. Iam li, kompatindulo, tute malesperis, ĉar li eraris nur iomete kaj jam aperis sur la tablo ostoj anstataŭ ostroj.*Pierre* : Jen eminenta instru-metodo.*Lise* : Precipe . . . efika. Nun jam Henriestras la kuiristan terminaron pli bone ol mi. Li trafoliumis vortarojn, elserĉis kaj notis ĉiujn esprimojn, rilatantajn al la mangado, kaj perfekte ilin elparkeris.*Henri* : Nur amuzu vin je mia kosto !*Pierre* : Aŭskultu, Henri, diru al mi, kial vi lernas Esperanton ? Ĉu ĝi plaĉas al vi ?*Henri* : Jes, ĝi tre plaĉas al mi.

Lise : Sed ankoraŭ pli ol Esperanto plaĉas al li la poŝtmarkoj. Vi ja konas lian ardan emon por filatelo. Do, vidinte la eksterlandajn poŝtmarkojn sur la kovertoj de miaj esperantaj korespondaĵoj, li subite ekinteresiĝis pri Esperanto. Apenaŭ li sciis konstrui kelkajn primitivajn esperantajn frazojn, li komencis serĉi adresojn de korespondontoj kaj fervore skribi en ĉiujn angulojn de Eŭropo, eĉ trans la oceanon.

Henri : Karulino, ne estas jam tempo vespermanĝi? Mi ne volas veni malfrue en la teatron.

Lise : Jes, mi kuras jam. Kion vi deziros vespermanĝi?

Henri : (*rapidege, per unu spiro elbuŝiĝas*) : Sufiĉas kuiritaj ovoj kun majonezo, kaj panrostaĵoj kaj glaseto da vino, aŭ legomo, eble vi havas pizojn aŭ artiŝokojn, aŭ se restas al vi de tagmanĝo la lumbaĵo, aŭ rostitan fiŝon kun tomata salato, aŭ malvarmajn viand-tranĉaĵojn, aŭ nur fromaĝon el kremo, blankan panon kaj buteron—

Lise (*signifoplene ridetas al Pierre, poste foriras*).

Pierre : Mian gratulon, Henri. Nun estis mi, kiu preskaŭ ne komprenis. —Kaj via korespondado? Ĉu ĝi sukcese progresas?

Henri : Jes, rigardu! (*Montras amason da leteroj*.) Tion mi ricevis hodiaŭ. Ankoraŭ mi ne havis tempon legi.

Pierre (*trarigardas la leterojn*) : Svedujo, Italujo, Portugalujo, Nederlando, Hispanujo . . .

Henri : Hispanujo? Montru!

Pierre (*ne donas al li la leteron*) : Interesa skribmaniero. Certe virino! (*Rigardas dorsflanken, legas la return-adreson*) Inéz Gorinda, Seville . . .

Henri : Inez! Donu al mi la leteron!

Pierre (*ŝerce*) : Ĉu eble amletero? Henri, Henri . . . Ĉu vi permesos? (*Li malfermas la leteron*.)

Henri (*volas malebligi tion*).

Pierre (*cedas al Henri, legas leteron, Henri persekutas lin, granda ludo—ili renversas seĝon k.t.p. laŭ la fantazio de la reĝisoro*) : “Mia arde amegata!”—ho, Henri, mi miras—(*li legas kun troigita patoso*)—“mi mortas pro sopiro je via dolĉa proksimo”—ĉarme—“nur al vi, nur al vi, me pensas . . .”

Henri (*klopodas preni de li la leteron, sukcesas kapti la koverton, revenas al la tablo kaj esploras la poŝtmarkojn sur la koverto*) : Inéz! Karulino! (*Li prenas la lupeon de sur la tablo kaj detale esploras la poŝtmarkojn sur la koverto*) Eminent! Ah, sopirata! Absolute perfekta! Belega koloro, tute ne difektita . . .

Pierre : Ne difektita? Permesu, sed tion ĉi—kiel vi povas scii tion?

Henri : Tion eblas ja rekoni. Mi estas fakulo.

Pierre : Jes, mi vidas, vi Don Ĥuano! Kaj kiel rigardas tion via Lise?

Lise (*silente enirinta*) : Kion?

Pierre : Sed . . . nenion. Nome ni . . . nur tiel . . . (*Klopodas kaŝi la leteron*).

Lise : Espereble ne—iaj amaferoj? Kian leteron vi havas?

Pierre : Tio estas . . . tion mi nur montris . . . al Henri—(*la letero falas el lia mano*).

Lise (*levas ĝin*) : Sed tio estas de Inéz! Henri! (*Ŝi donas la leteron al Henri*).

Henri : Mi scias . . .

Pierre (konsternite) : Ĉu vi—scias pri tio ?

Lise : Pri kio ?

Pierre : Ke Henri . . . adoras tiun Inéz ?

Henri : Mi ? Permesu . . .

Pierre : Vi ja ĵus preskaŭ prikantis ŝin ? Perfekta, nedifektita . . .

Lise : Kiu ? Inéz ?

Henri : Diable, Inéz. Jen—la ruĝa 3-peseta—kun tiu akra dentrando—*(li montras la poŝtmarkon)*.

Pierre : Tiel do—vi parolis pri la poŝtmarko . . .

Henri : Inéz estas karulino, ĉar ŝi sendis ĝin . . .

Lise (legas la leteron) : Ŝi skribas, ke ŝi preparas surprizon por vi.

Henri : Kian ?

Lise : Mi ne scias. *(Ŝi donas al li la leteron)*. Legu vi mem.

Pierre : Ĉu vi vere ne ĵaluzas pri tiu Inéz ? Ŝi ja . . . en sia letero . . . preskaŭ konfesas al li la amon . . .

Lise : Preskaŭ ? Ŝi konfesis la amon al li jam multan fojon. Pri tio iomete kulpas mi mem.

Pierre : Ĉu vi ?

Lise : Mi—kaj la filatela emo de Henri. Inéz estis lia unua korespondantino. Mi havigis ŝian adreson kaj helpis al li ĉe liaj unuaj leteroj. Tiuj estis ankoraŭ tute konvenciaj, kiel kutime—sed po iome sendis Inéz pli kaj pli ardajn leterojn—nu . . . kaj—ĉar ŝi samtempe sendis ankaŭ la hispanajn poŝtmarkojn—Henri ne volis perdi ĉi eblon ; kaj mi mem volis, ke Henri pliperfektigu en Esperanto—kaj tiel okazis, ke Inéz ĝis hodiaŭ ne scias, ke Henri estas jam edzo

. . . sed ŝajnas, ke nun vi jam devos iel informi ŝin . . .

Henri : Kial mi ? Vi kulpas pri tio, do informu ŝin vi . . . sed ne. Tio ne estas ebla. Ŝi ne plu skribus al mi kaj mi ne havus poŝtmarkojn.

Lise : Ah, tiuj viaj poŝtmarkoj !—Kaj mi petas, preparu vin jam, por ke ni foriru, alie ni malfruigos . . . *(ŝi foriras)*.

Pierre : Interesa amaventuro. *(legas la leteron)*. Tiu Inéz nepre estas fajro-flamo. Ĉu vi ne timas iomete, Henri ?

Henri : Mi ? Kion ? Ĉu mi timu Inéz ? Ŝi estas ja malproksima—*(aŭdiĝas sonorado)* Mi petas, malfermu, mi devas ankoraŭ ŝanĝi la veston. *(Li foriras)*.

Pierre (iras malfermi).

Inéz : Ah, fine do ! Nu, jen vi estas—*(ŝi eniras, metas siajn manojn sur la ŝultrojn de Pierre, entuziasme rigardas lin)*. Jes, tiel, ĝuste tiel mi vidis vin en miaj sonĝoj ! Tia mi imagis vin ! Henri, kara, karega Henri ! *(Ŝi arde ĉirkaŭprenas kaj volas kisi lin)*.

Pierre : Pardonu, sed mi . . .

Inéz : Karuleto, ĉu vi ne ĝojas, ke mi alveturis ? Vi ja deziris tion, vi skribis ja, ke vi ŝatus koni min persone . . . kaj jen mi estas do . . . via Inéz . . . cia Inéz . . . *(ŝi ĉirkaŭprenas kaj kisas lin)*.

Pierre : Permesu . . .

Inéz : Henri !

Pierre : Sed mi ja ne estas Henri !

Inéz : Kion vi diras ? Mi troviĝas ja en la strato Noire, n-ro 17, la dua etaĝo—kaj sur la pordo estas vizitkarto kun via nomo. Vi malfermis la pordon, vi parolas esperante . . .

Pierre : Sed mi ne estas Henri, fraŭlino. Henri estas mia amiko.

Inéz : Sed permesu, sinjoro, tio ĉi estas ja impertinenteco ! Kion vi pensas pri mi ? Ah, kia aroganteco, kolosa aroganteco ! Vi tute trankvile ĉirkaŭbrakas kaj kisas min—kaj vi ne estas Henri ! Kie do estas mia karega Henri ?

Pierre : Tuj mi vokos lin—kun via permeso—Henri !

Henri : Jes ? (*Envenas*).

Pierre : Bonvolu—Henri . . .

Inéz : Henri ! Karuleto mia ! (*ŝi ĵetas sin al li, arde ĉirkaŭprenas kaj kisas lin*).

Henri : Pardonu, fraŭlino . . .

Inéz : Henri ! Fine mi do estas ĉe vi ! Mi povas vin vidi, karesi, kisi—aĥ, Henri, kial vi estas tiel glacie malvarma ?

Henri : Mi ne komprenas . . .

Inéz : Ĉu via koro nenion diras al vi ? Ĉu vi ne konas, ne rekonas min ?

Henri : Mi—vere . . .

Pierre : Fraŭlino Inéz !

Henri (konsternite) : Inéz !

Inéz : Jes. Inéz Maria Isabela Gorinda. Via Inéz. Cia Inéz. Henri, kiel mi sopiregis vin ! Mia kara, karega, mia plej kara Henri ! (*ŝi ĉirkaŭbrakas lin*).

Lise (eniras) : Pardonu . . .

Inéz : Henri ! Kion ĝi signifas ? Kiu ŝi estas ? Aĥ, ĉu eble — via amatino ?

Henri : Ne, nome . . .

Inéz : Henri ! Ĉu vi memoras, kion mi skribis al vi ? Ho, se ŝi vere estas via . . . via . . . Henri, mi elskrapos al vi la okulojn, kaj al ŝi ankaŭ—mi elŝiros al ŝi la harojn—

mi elskuos la animon el ŝi—mi . . . mi . . .

Henri : Sed—karulino . . .

Lise : Karulino !

Inéz : Kiu ŝi estas ? Parolu ! Parolu do !

Henri : Tio estas, . . . ŝi estas . . . mia . . . mia fratino !

Lise : Henri !

Henri (malespere skuas la kapon).

Inéz : Fratino ! Fratineto, fratinjo ! Aĥ, Henri, vi stultuleto, kial vi tuj ne diris tion al mi ? (*ŝi iras al Lise*). Karulinjo, mi estas ege feliĉa, ke mi interkonatiĝas kun vi. Vi havas eminentan fraton, mi adoras lin. Ĉu li rakontis al vi pri mi ? Mi estas Inéz.

Lise : Inéz !

Inéz : Jes, Inéz. Henri, karulo, bonvolu prezenti min. (*ŝi man-signas al Pierre*).

Henri : Jes, certe—kun ĝojo—jen mia amiko Pierre . . .

Lise : Mia fianĉo (*al Pierre*) ĉu ne, kara ?

Pierre (surprizite) Sed . . .

Henri : Lise !

Lise : Vi deziras (*signifoplene*) fraĉjo ?

Inéz : Vere mi estas ege feliĉa, ke mi interkonatiĝas kun vi ĉiuj. (*Al Henri*) Espereble vi ricevis mian lastan leteron. Kion vi diras pri mia surprizo ?

Henri : Tio estas—vere—surprizo. Ĉu vi restos en Parizo longe ?

Inéz : Aĥ, nun mi neniam plu forlasos vin, karuleto. Mi estis transpostenigita en Parizon. Kion vi diras pri tio ? Tio estas kolosa . . .

Henri : Kolosa ! Kaj kiu sendos al mi poŝtmarkojn el Hispanujo ?

Inéz : Poŝtmarkojn ! Karuleto, kiel vi povas pensi pri tiaj bagatelaĵoj nun, kiam ni finfine estas kune ! Ho, kiel mi ĝojegis de vi ! Vi montros al mi Parizon—ni vizitos teatrojn, kafejojn, ni dancos kune . . . mi esperas, ke vi dancas. Neniam vi skribis tro multe pri vi mem . . . ni iros tuj ĉi vespere, ĉu ne ?

Henri : Ĉi vespere ? Sed mi—sciu—ni estas—ni volis . . . ni . . . ni havis biletojn por Folies Bergère . . .

Inéz : Oh, belege ! Vi estas kolosa !

Henri : Sed mi . . .

Lise : Vi povas iri kun fraŭlino Inéz—mi restos hejme kun Pierre—(al Pierre) ĉu ne vere, knabeto mia ?

Henri : Lise !

Lise : Sed tio estas ja memkomprenebla, kara frateto. Vi devas montri Parizon al fraŭlino Inéz. Estu certa, ke Pierre kaj mi ne enuiĝos ĉi tie . . .

Inéz : Tio estas belega, Henri ! Via fratino estas kolosa. Kaj ŝia fianĉo estas tre interesa sinjoro. Ili ambaŭ aspektas belege—tiel ĉarma pareto ! Certe ili ege amas sin reciproke, ĉu ne, Henri—sed ni amas nin ankoraŭ pli multe, ĉu ne, karuleto ! Aĥ, Henri, mi estas tiom ege feliĉa . . . Venu, mi volas esti kun vi . . . vi scias ja . . . sola . . .

Lise : Rapidu, Henri, alie vi maltrafos la komencon.

Henri : Lise, vi ja ne povas resti kun Pierre . . .

Inéz : Sed komprenu, karuleto, enamigintaj homoj . . . ili ŝatas ja solecon.

Lise : Vidu, frateto, kaj vi neniam volas tion kompreni. (Al Pierre) Ni vespermanĝos hejme, ĉu ne, bubeto . . .

Henri : Bubeto ! Ŝi diras al li bubeto !

Inéz : Sed ĝi estas ja terure ĉarmega ! Vi estas ankaŭ mia dolĉa bubeto. (Ŝi karespremas sin al li, proponas siajn lipojn al kiso) Henri !

Henri (kun embaraso ektuŝas per lipoj ŝian vangon).

Inéz : Aĥ, Henri ! Kio ĝi estis ?

Henri : Pardonu . . . mi . . . mi . . .
. . . vin . . . kisis . . .

Inéz : Ĉu tion ĉi vi nomas kiso ?
Henri—venu al mi—pli proksimen ankoraŭ pli—(ŝi arde ĉirkaŭprenas kaj kisas lin) Jen tiel—tiel kisas ni, Hispaninoj, karuleto.

Henri (senspire falas sur la seĝon).

Lise (al Pierre) : Karulo, vi ankaŭ devas kisadi min tiel . . .

Henri (eksaltas) : Nur provu tion !

Lise : Sed, frateto . . .

Henri : Mi ne permesos tion ! Ne permesos !

Inéz : Henri, karuleto, kiel vi nur povus estu tiom malĝentila, tiel ege kruela, kaj malpermesi al via fratinjo . . .

Lise (al Pierre) : Venu, kara, ni ne ĝenu ilin . . . (ŝi volas foriri kun Pierre).

Henri : Haltu ! Nenien vi iros ! Pierre, iru for de ŝi—tuj ! Kaj vi lasu lin—tuj !

Inéz : Henri ! Ne estu tiel brutala al via fratino !

Henri : Diable, fratinjo ! Sufiĉis jam la komedio !

Inéz : Ĉu komedio ? Aĥ, Henri, kion ĝi signifas ? Kiu ŝi estas ? Aĥ, ŝi estas via amatino, ĉu ne ?

Henri : Amatino ! Tute ne, karulino, sed . . . mia edzino !

Inéz : Henri ! (Ŝi falas sur seĝon).

Henri : La hispanaj poŝtmarkoj estas en la infero ! Lise, ni iras teatron.

Pierre : Henri . . . espereble vi ne lasos min ĉi tie . . .

Henri : Malaperu, vi—ni ankoraŭ parolos pri tio, sinjoro . . . fianĉo !
(*Li foriras kun Lise*).

Inéz (leviĝas) : Henri ! (*singultas*).

Pierre (estas embarasita, volas foriri, poste paŝas al Inéz) : Trankviliĝu, fraŭlino, mi petas vin . . .

Inez : Lasu min ! Kial vi ne diris tion al mi ? Vi sciis tion . . . li estas edzo . . . hooooo . . . ĉu vi aŭdas ? Vi sciis tion—kaj tamen vi silentis.
(*ŝi spasma kaptas liajn jakfaldadojn*)
Vi estas malbona, malbelega, terura . . .

Pierre : Fraŭlino Inéz, mi petas, trankviliĝu . . .

Inéz : Kaj mi tiom ege ĝojis . . . mi rapidis al li . . . ho, kia seniluziiĝo—mi ne postvivos ĝin . . . (*ŝi metas sian kapon sur la ŝultron de Pierre kaj singultas*).

Pierre : Se vi permesos, mi klarigos al vi ĉion . . .

Inéz : Silentu ! Mi volas nenion aŭdi.

Pierre (timeme karestuŝas ŝiajn harojn) : Mi ne scias, ke Henri ne skribis al vi . . . ke li prisilentis . . .

mi komprenas vian seniluziiĝon, kara fraŭlino.

Inéz : Mi tiom ege ĝojis, ke mi ekkonos Parizon . . .

Pierre : Se vi permesus . . . mi konas Parizon pli bone ol . . . Henri . . . mi ĝojus esti via ĉiĉerono.

Inéz : Jes ?

Pierre : Eble . . . mi pli bone dancas, ol Henri . . .

Inéz : Jes ? (*subite ŝi rektiĝas*) Ĉu vi estas edzo ?

Pierre : Mi ? Ne !

Inéz : Kaj . . . ĉu vi ne estas fianĉo . . . de tiu . . .

Pierre : Nepre ne !

Inéz : Ĉu mi povas kredi al vi ?

Pierre : Mia honora vorto !

Inéz : Ĉu vi kolektas poŝtmarkojn ?

Pierre : Mi malŝatas filatelon !

Inéz : Ĉu vere ? Kaj kion vi ŝatas ?

Pierre : Mi adoras . . . Hispanujon . . .

Inéz : Ah ! Kial ?

Pierre : La Hispaninoj estas belegaj virinoj . . . kiel ili scias kisi . . .

Inéz (ĵaluze) : Kiel vi scias tion ?

Pierre : Vi mem . . . ja donis al mi pri tio neprajn pruvojn . . . kvankam nur pro miskompreno . . .



ĈEFVERKO EN ĤINA VESTO

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., aŭfranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 271

la 29an de marto, 1955

ĜENERALA VOĈDONO. Laŭ decido de la Komitato, okazos ĝenerala voĉdono inter la 15a de aprilo kaj la 15a de julio 1955 koncerne la Statuton de UEA, propono de marto, 1955. Partoprenos la Aliĝintaj Landaj Asocioj kaj individuaj membroj en landoj kie ne ekzistas aliĝinta asocio.

ELEKTO DE DELEGITOJ. Konforme al la Statuto de UEA, okazas en la nuna jaro elekto de Delegitoj fare de la Aliĝintaj Landaj Asocioj. Tiuj Asocioj estas petataj prizorgi ke la nomoj de elektitaj kaj reelektitaj Delegitoj atingu la Centran Oficejon ĝis la 30a de septembro.

STATISTIKO. Enspezoj montras, ke la membraro kontentige kreskas kompare kun la pasinta jaro, sed pro provizora prokrasto de enskriboj ĉe la oficejo, la publikigo de statistiko povus krei miskomprenojn, kiel okazis sekve de la pasintmonata statistiko. Oni montros objektivan statistikon en la venonta Informilo.

DELEGITOJ

Francujo

Saint-Nazaire (Loire-Inférieure). FD (Filatelo) : P. Bonamy, Boulevard Jean Mermoz.

Soissons (Aisne) D : S-ino S. Fiat, 8 avenue Voltaire. Tel : 11.

Paris. FD (Doganaj aferoj) : G. Larglantier, 29 Bd. Murat, Paris-16. Tel (Oficejo) : KLE 42-15.

Germanujo

Frankfurt/Main. FD (Instruado) : vakas.

Ravensburg (Württemberg). D : vakas.

Italujo

Verona. FD (Sporto) : D-ro P. Bonomi, Via Camozzini, 15. Tel : 24394.

Svedujo

Stockholm. FD (Budhismo) : vakas.

Svislando

Zürich. D : W. Sonderegger, Albertstrasse 3. Tel : (051) 42 18 78.

Usono

Orange (New Jersey). D : J. Salles, 153 Cleveland St. Tel : Orange 2-8608.

Quakertown (Pennsylvania). D : D. Munro, R.D.Z, Box 312. Tel : Quakertown 926-R3.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Pfanner, S-ro J. R., Gandorhun, Siera-leono

PATRONO 1955

8. Breth, S-ro F. W., Petrolia, Usono

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1955

341. Wong Ken, S-ro, Oxford, Anglujo
342. Hoyle, F-ino I., Huddersfield, Anglujo
343. Akerø, S-ro Edv., Bergen, Norvegujo
344. Alberich-Jefré, S-ro S., Barcelona, Hispanujo

345. Bremón Masgrau D-ro J., Barcelona, Hispanujo

346. Fernández, S-ro F., Lugo, Hispanujo

347. Marqueta, S-ro A. P., Zaragoza, Hispanujo

348. Menéndez González, S-ro A., Gijon, Hispanujo

349. Miralles, S-ro E., Valencia, Hispanujo

350. Monsalve Cruz, S-ro V., Madrid, Hispanujo

351. Francis, S-ro R., Gravesend, Anglujo

352. Rossetti, S-ro R., Birmingham, Anglujo

353. Unchitti, S-ro C. L., Bangkok, Tajlando

354. Wolff, F-ino H., San Francisco, Usono

355. Buchhein, S-ro W. A., Denver, Colo., Usono

256. Beliard, S-ro L., Nantes, Francujo

357. Bourdelon, S-ro H., Marseille, Francujo

358. Crochet, S-ro M., Eprenay, Francujo

359. Luez, S-ro D., Laon, Francujo

360. Motto, S-ro R., Arles, Francujo

361. Vautrin, S-ro J., Paris, Francujo

362. Yelland, S-ro E. E., Aspremont, Francujo

363. Bouteille, S-ino P., Toulouse, Francujo

364. Jelenc, S-ro F., Maison Carrée, Alĝerio

365. Courtis, S-ro A., Gabon, Fr. Ekv. Afriko

367. Dutra d'Amorim, S-ro N., Maceió, Brazilo

368. de Oliveira, S-ro L. J., Santos, Brazilo

369. de Abreu, S-ro W., Pindamonhangaba, Brazilo

370. Almada, S-ro F. S., São Paulo, Brazilo

371. Baggi de Araujo, F-ino I., Rio de Janeiro, Brazilo
372. Gomes Braga, S-ro I., Rio de Janeiro, Brazilo
373. Carvalho, S-ro A., Bebedouro, Brazilo
374. Coutinho, S-ro A. C., Rio de Janeiro, Brazilo
375. Falcão, S-ro F., Belém, Brazilo
376. de Moraes, S-ro A., Rio de Janeiro, Brazilo
377. Villa Nova, S-ro T. T., Recife, Brazilo
378. Nunes, S-ro E. P., São Paulo, Brazilo
379. Pauluk, S-ro J., Irati, Brazilo
380. Peccioli, S-ro I., Jaú, Brazilo
381. Dias Pinto, S-ro J., São Caetano do Sul, Brazilo
382. Siedlecki, S-ro K., Matinhos, Brazilo
383. Souza, S-ro F. F., Rio de Janeiro, Brazilo
384. Teizeira, S-ro D., Belo Horizonte, Brazilo
385. Timponi, D-ro M., Rio de Janeiro, Brazilo
386. de Jong, S-ro H., Umtata, Sudafriko
387. Kushlick, S-ro I., Johannesburg, Sudafriko
388. Woodruff, S-ro E. W., Johannesburg, Sudafriko
389. Nielsen, S-ro B., København, Danlando
390. Aardestrup, S-ro T., København, Danlando
391. Rosengaard Hansen, S-ro A. E., Middelfart, Danlando
392. Hansen, S-ro A. H., København, Danlando
393. Hansen, S-ro E., København, Danlando
394. Hansen, S-ro H., Holbaek, Danlando
395. Jahn, S-ro C. J., Brønshøj, Danlando
396. Jensen, S-ro H. E., Toustrup, Danlando
397. Jørgensen, S-ro G., Skovstrade, Danlando
398. Larsen, S-ro E., Fredericia, Danlando
399. Larsen, S-ro L., Odense, Danlando
400. Mertner, S-ro E. V., Engesvang, Danlando
401. Miede, S-ino M., København, Danlando
402. Møller, S-ro P., Viborg, Danlando
403. Nederland, S-ro O., Oksbøl, Danlando
404. Petersen, F-ino A., København, Danlando
405. Rasmussen, S-ino N., Aarhus, Danlando
406. Ritzau, S-ro V., Køge, Danlando
407. Skole, S-ro S. B., Hjørring, Danlando
408. Trier, S-ro B. S., Haslev, Danlando
409. Vasiljef, S-ro L., København, Danlando
410. Waarst, S-ro E., Aalborg, Danlando
411. Ohrberg, S-ro P. M., Nykøbing, Danlando
412. Höfert, S-ro F., Wien, Aŭstrujo
413. Schmidt, S-ro Pastro A., Graz, Aŭstrujo
414. May, S-ro J., St. Wendel, Sarlando
415. Grütter, S-ino L., Samedan, Svislando
416. Rehmann, S-ino A., Genève, Svislando
417. Lingua, S-ro H. A., Rosario, Argentino
418. Noordhoff, F-ino D., Laren, Nederlando
419. Roelofsen, S-ro Inĝ. S., Oost, Nederlando
420. Boyet, S-ro F., Sarreguemines, Francujo
421. Dat, S-ro V., Port Lyautey, Maroko
422. Degrijse, S-ro A., Roeselare, Belgujo
423. Impanis, F-ino M.-R., Brussel, Belgujo
424. Phelan, S-ro H. K., London, Anglujo
425. Atkinson, S-ro W. G., Worcester Park, Anglujo
426. Howell, F-ino B., Bristol, Anglujo
427. Clarke, S-ro W., Dunfermline, Skotlando
428. Eldon, S-ro H. B., Southport, Anglujo
429. Relf, S-ro E. F., Addlestone, Anglujo
430. Sinclair, F-ino P. C., Buckhaven, Skotlando
431. Ramsay, S-ro Ch., East Devonport, Tasmania, Aŭstralio
432. Viti, S-ro G., Messina, Italujo
433. Girolodi, F-ino A., Torino, Italujo
434. Brunet, S-ro P., Valenciennes, Francujo
435. Duthilleul, S-ro J., Caen, Francujo
436. Lagarde, S-ro L., Paris, Francujo
437. Poly, S-ro P., Paris, Francujo
438. Prud'hon, S-ro G., Fontenay, Francujo
439. Ashmore Baker, S-ro C., Exeter, Anglujo
440. Blacklock, S-ro L. E., Parkstone, Anglujo
441. Cottam, S-ro E., Sunderland, Anglujo
442. Hoyle, S-ro J., Manchester, Anglujo
443. Knight, S-ino E. B., London, Anglujo
444. Laudyn-Chrzanowski, S-ino E. A., Newquay, Anglujo
445. Sarfas, S-ro E. W., New Barnet, Anglujo
446. Squire, F-ino E., West Hartlepool, Anglujo
447. Ashworth, S-ro H. F. S., Liverpool, Anglujo
448. Fraser, F-ino R. G. M., Ilford, Anglujo
449. Collins, S-ro E., Toronto, Kanado
450. Sly, S-ro K. A., Letchworth, Anglujo
451. Banham, S-ro F. R., Essendon, Aŭstralio
452. Latimer, S-ro R. F., Nowra, Aŭstralio
453. Bevan, S-ro G., Wrexham, Kimrujo
454. Ison, F-ino H. M., Ardsleigh, Anglujo
455. Robinson, Kapitano K. E., Croydon, Anglujo
456. Maier-Bevel, S-ino A., Vancouver, Kanado
457. Smilga, S-ro K., Toronto, Kanado

458. Heimann, D-ro W., Montevideo, Urugvajo
 459. de Azeredo Coutinho, D-ro L., Belo Horizonte, Brazilo
 460. Pires, F-ino O., Pindamonhangaba, Brazilo
 461. Kolonay, S-ro E., Juiz de Fora, Brazilo
 462. Collect de Araujo, S-ro B., Rio de Janeiro, Brazilo
 463. Moreira, S-ro J., Rio de Janeiro, Brazilo
 464. Zamora, S-ro A., Porto Alegre, Brazilo
 465. de Albuquerque, D-ro J. J., Cidade de Atalaia, Brazilo
 466. Soares de Araujo, S-ro G., Rio de Janeiro, Brazilo
 467. Barbosa, S-ro J. da C., Belém, Brazilo
 468. Cruz, S-ro C., Juiz de Fora, Brazilo
 469. Dionísio, S-ro C. H., São Leopoldo, Brazilo
 470. Derby Dutra, S-ro O., Juiz de Fora, Brazilo
 471. Pitta, S-ro H., Salvador, Brazilo
 472. Della Rosa, S-ro N., Americana, Brazilo
 473. de Sant'ana, Kapitano J. F., Juiz de Fora, Brazilo
 474. da Silva, S-ro H. P., Belo Horizonte, Brazilo
 475. da Silveira Filho, S-ro I., Juiz de Fora, Brazilo
 476. Lima Verde, D-ro D., Limoeiro do Norte, Brazilo
 477. Martins Viana, S-ro I. L., Belo Horizonte, Brazilo
 478. Viana, S-ro J., Belo Horizonte, Brazilo
 479. Wehrs, S-ino E., Niteroi, Brazilo
 480. Ehrlich, S-ro B., Sydney, Aŭstralio
 481. Thomson, S-ro R., Kalamunda, Aŭstralio
 482. Bily, S-ro H., Berlin, Germanujo
 483. Barkhausen, S-ro H., Bremen, Germanujo
 484. Berger, S-ro J. G., München, Germanujo
 485. Brückner, S-ro M., Stolberg, Germanujo
 486. Deneffe, S-ro J., Hochheim, Germanujo
 487. Diener, S-ro A., Freiburg, Germanujo
 488. Glasow, S-ro R., Ibbenbüren, Germanujo
 489. Grasmair, S-ro E., Berlin, Germanujo
 490. Hauber, S-ro R., Bad Aibling, Germanujo
 491. Hieronymus, S-ro F., Hamburg, Germanujo
 492. Klünder, S-ro W., Burgsteinfurt, Germanujo
 493. Lamprecht, D-ro H., Essen, Germanujo
 494. Renken, D-ro C., Bremen, Germanujo
 495. Strauch, S-ro A., Bad Pyrmont, Germanujo
 496. Böcker, S-ro H., Gelsenkirchen, Germanujo
 497. Engen, S-ro P., Vestfossen, Norvegujo
 498. Nesje, S-ro H., Fogedgaarden, Aalesund, Norvegujo
 499. Skogstrøm, S-ro G., Drammen, Norvegujo
 500. Skogstrøm, S-ino L., Drammen, Norvegujo
 501. Stjernesund, S-ro E., Lillestrøm, Norvegujo
 502. Tveit, S-ro M., Stavne, Norvegujo
 503. Haas, S-ino P., Maribor, Jugoslavujo
 504. Šaponjić, S-ro Inđ. M., Beograd, Jugoslavujo
 505. Krppner, S-ro W., Erfoud, Maroko
 506. Quillivic, S-ro J., Marrakech, Maroko
 507. Cuené, S-ro M., Meknès, Maroko
 508. Denarnaud, S-ro Prof., Meknès, Maroko
 509. Vidal, S-ro J., Meknès, Maroko
 510. Nicolaisen, Ltn. O. T., Feltpost 50, Norvegujo
 511. Nielsen, S-ino E., Vejle, Danlando
 512. Moore, S-ro V. R., Upper Hutt, Novzelando
 513. Allan, S-ro J., Wellington, Novzelando
 514. Clark, S-ro B., Leigh, Novzelando
 515. Clarkson, S-ro R. J., Tauranga, Novzelando
 516. Dearnley, S-ro E. R., Wellington, Novzelando
 517. Cook, S-ro H. G. L., Parkstone, Anglujo
 518. Saunders, S-ino A. J., Ventnor, Anglujo
 519. Pacelli, S-ro prof. G., Pisa, Italujo
 520. Brown, S-ro A. L., Washington, D.C., Usono
 521. Bush, S-ro J. E., Milwaukee, Usono
 523. Lippmann, S-ino E. C., Brooklyn, Usono
 524. Sumner, S-ro F. H., Oregon, Usono
 525. Vidack, S-ro J., Seattle, Usono
- DONACOJ al la Ĝenerala Kaso :**
 K. Weile 10ŝ., Grupo de Esperantistaj Edukistoj £12 8ŝ. *Ni plej sincere dankas.*
- DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo :**
 A. Paolet 10ŝ., Grupo en Verviers £2 3ŝ., H. Boffejon £1 8ŝ. 6p., D-ro P. Kempeneers £1 13ŝ. 6p., R. Geerinck 7ŝ., donacoj ricevitaĵe ĉe U.K. Haarlem £4 17ŝ. 2p.
 Sumo ĝis 31.3.55 : £1,215 4ŝ. 8p.
 Manko en la kaso : £60 8ŝ. 3p.
Al ĉiu kontribuanto al forigo de tiu deficito, la Asocio tutkore dankas.
 JOHN C. RAPLEY, *Sekretario.*

ANONCETOJ

Kosto : *du pencoj por ĉiu vorto, aŭ 1 respondkupono por ĉiu duo da vortoj.*
La oficiala aperdato de la revuo estas la 1-a de ĉiu monato. Anoncetoj devas atingi la Centran Oficejon kvin semajnojn antaŭ la aperdato de la celata numero.

Lia Brilo estas kiel hela lumo, Radioj iras el Lia mano kaj tie estas kaŝita Lia potenco.

Hab. 3. 4.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 12ŝ. 6p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝodaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, "Flat Four", 1 Warrington Crescent, LONDON W.9, Anglujo. Telefono CUNningham 4487.

Popolartajn artiklitojn, lokomotivajn objektetojn, ĉiuspecajn folkloraĵojn deziras Alkis Georgandelis, PLOMARI, Lesvos, Greklando. Rekompencas laŭdezire.

P.M. deziras interŝanĝi—nur neuzitaj preferinde datrevenaj laŭ la oficiala monŝanĝo—petu informojn—Luis Vicino, Maza 1450, 23/7, BUENOS AIRES, Argentino.

Instruistino pasigos la someron en Italujo kaj deziras viziti gesamideanojn kiel paganta gasto. J. Gardner, 7 Cadmus Street, NICOSIA, Cipro.

Liberpensuloj atentu ! Ĉiu Esperantisto kiu sentas sin liberpensulo, ateisto, k.t.p., nekredante je superstiĉo aŭ supernaturismo, estas alvokata grupiĝi en la Liberpensula Esperanto-Amikaro. Interesatoj bonvolu interrilati kun S-ro Eduard Weichmann, DORTMUND-KIRCHDERNE, Lotenkamp, 4, Germanujo.

Ni afable petas informojn pri junularo uzanta Esperanton, akceptas esperantajn gazetojn kaj rekompencas laŭpove kaj laŭdezire: Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo, Benczur u. 34, BUDAPEST VI, Hungarujo.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj:—Januara kaj Maja numeroj de "Espéranto et Culture", kun raportoj, artikoloj, informoj oficialaj. Po du respondkuponoj de Dumarquez, Anzin St. Aubin, par ARRAS (P. de C.) Francujo.

Maja Festo okazos ĉe Tinkers Farm Girls' School (Knabina Lernejo), Northfield, BIRMINGHAM 31, Anglujo, la 25an de Majo. Gelernantoj el aliaj landoj bonvolu

sendi salutkartojn Esperantlingve. Nepre respondos.

Volas korespondi tutmonde anoj de la Esperanto Klubo de Wellington, Nov-Zelando. Komencantoj bonvenaj. Unu respondo garantiita. Skribu al S-ro Dearnley, Box 330, WELLINGTON C1, Nov-Zelando.

Invito al memvola laborservo de la junularo en la regiono Salzburg lan ĝis 21a aŭgusto 1955. Detalaj informoj kaj aliĝilo kontraŭ du respondkuponoj ĉe Jos. Steppan, HÜTTLINGEN/Württ., Abtsmünder str. 17, Germanujo.

Helsingør vokas. La Internaciaj FERIAJ Kursoj okazos ĉijare de 17-24 Julio. Estos kursoj daŭriga, konversacia, prepara por Cseh-instruistoj, kaj infana. Informas L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

La Kongreso de K.E.L.I. okazos en Reims, Francujo, de la 23-a ĝis 30-a de Julio.

Vesako, 2499 : Okaze de la Plenluno de Majo, Budhanoj tutmonde deziras al ĉiuj Estaĵoj ĉie, en ĉiuj Mondo, Pacon kaj Benojn.

Esperantistaj framasonoj kiuj partoprenos la 40-an U.E.K. en Bologna (Italujo) bonvolu sin anonci al jena adreso : Spett. Circolo "Olona" (Esperanto-sekcio) Corso di Porta Nuova, 16, MILANO (137) Italujo.

ĈINA KOMERCA AGENTO : Vendas ĉiujn ĉinajn kaj aziajn poŝtmarkojn, ĉinajn ludkartojn kaj ĉiujn aliajn objekt-ojn. Liveras laŭdezire ĉiun varon al tutmondaj kolektantoj kaj bezonantoj. Prezoj tre moderaj. Deziras kontakti kun ĉiulandaj maristoj kaj ŝipanoj, kies ŝipoj vojaĝadas Hongkongon. Deziras korespondi kun usonaj gesamideanoj kaj ĉiulandaj komercistoj. Serĉas korespond-reprezentantojn ĉiulande por kunlabori iun entreprenon internacian. Skribu AERPOŝTE al S-ro Wong Ling Kai, 72 Lockhart Road, 1st Floor, HONG KONG.

LA INTERNACIA LINGVO

Faktoj pri Esperanto

D-ro Ivo Lapenna

Esperanto kiel solvo de la problemo de internacia lingvo

La Esperanto-organizaĵoj : iliaj celoj kaj laboro

U.E.A.—historio kaj laboro

192 paĝoj, bone presita kaj bele bindita

Prezo : 10 ŝilingoj, afranko 6p.

Libro nepre bezonata de ĉiu propagandisto, kaj efektive de ĉiu agema
Esperantisto

Universala Esperanto-Asocio,

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ido kiel lingva projekto jam ne estas aktuala. Sed la idismo, la ŝajnlogiko ankoraŭ minacas difekti nian lingvon. Tial ĉiu esperantisto nepre legu la libron

Du Malsanoj en Esperanto

de H. A. de Hoog

El la recenzoj :

SAT-AMIKARO : Ne nur gramatikemuloj, sed ankaŭ laikuloj trovos en ĝi trafajn argumentojn kontraŭ la novmodajn esprimojn kaj ĝue tralegos ĉiujn paragrafojn forte stampitajn de agnosko al la admirinda lingva intuicio de Zamenhof
REVUO ESPERANTO : Nur ĉe ĝia apero en libra formo oni povis ĝuste taksi ĝian valoron espereble tio sufiĉos por instigi almenaŭ ĉiun instruiston kaj verkanton de lernolibro aĉeti ĝin.

140 paĝoj broŝurita. Bona papero. Prezo sv. Kr. 4.40 inkl. sendkosto de la eldoninto :

Erik Carlén,

Hallabrottet, Svedujo, poŝtgiro 343481,

aŭ ĉe via nacia Esp. eldonejo aŭ ĉe la libroservo de U.E.A.
Prezo 6ŝ., afranko 4p.